

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 572-3 (7-8) JUL.-AŬG. 1953



**Bildo de la poŝtmarko eldonota
honore al la kongreso.**

N-ro 572-3 (7-8)

Jul.-Aŭg. 1953.

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redattoro : HANS JAKOB
Palais Wilson, Genève, Svislando

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represadon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono (1953) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paço £6 ½ paço £3
¼ paço 30 sêl. ⅓ paço 15 sêl.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj

Eldon **numero 6000**



Enhavo

Specialaj artikoloj :

Ek al la 38a Kongreso : <i>Hans Jakob</i>	209
Grava Pliboniĝo de nia informado : <i>I. Lapenna</i>	222
La Londona Klubo jubileas	215
La rolo de la Landaj Asocioj : <i>P. Kempeneers</i>	217
Mi eskortis la Reĝinon : <i>T. C. Hawley</i>	235
Pri digoĵ, polderoj kaj inundoj : <i>M. de Waard</i>	231

38a Universala Kongreso :

Oficiala Komunikó n-ro 8	220
Marŝalo Tito, Esperantisto !	221

Poezio :

Solem la Çifonisto... *Reto Rossetti* 238

Konstantaj Rubrikoj :

El la redakcio	216
Enigma Konkurso	240
Esperantista Vivo	210
Internacia Konkurso	210
Nia Forumo ..	229
Oficiala Informilo	239
Radio kaj Esperanto ..	228
Tra la Mondo Esperantista	211

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 572-3 (7-8)

Jul.-Aŭg. 1953



Ek al la 38-a Kongreso

KIAM tiu-ĉi numero de nia revuo atingas nian legantaron (almenaŭ grandan parton) multaj samideanoj faras la lastajn preparojn por ekveturi al la nunjara kongreso. En la ciklo de nia agado la universala kongreso estas finpunkto, post kiu rekomenciĝas ĝenerale la laboro. Ja estas multaj, kiuj revenas de la kongreso kun nova entuziasmo, novaj impresoj kaj ankaŭ sinpromesoj, plenumi maksimumon por la bono de nia afero.

En la jaro 1905 kunvenis por la unua fojo la Esperantistoj en kongreso. Ili iris al Bulonjo parte dubemaj, parte senpaciencaj. Ili sin demandis ĉu la eksperimento estos sukcesa, ĉu la interkompreno estos tiom rekta kiom oni kredis. La eksperimento sukcesis. Sekvis longa vico da kongresoj, inter-rompita nur de la du gigantaj katastrofoj kiujn devis trairi la homaro. Disfalis regnoj, senvaloriĝis ideoj, la mondo transformiĝis, *sed* nia Esperanto vivas! Ĝi vivas malgraŭ blokado, spite “malvarmajn” malpermesojn kaj subpremojn; ĝi vivas spite falsajn profetojn proklamantaj perfektan solvon de la problemo de internacia lingvo pere de “dulingvismo”.

Videbla pruvo pri la vivo de nia lingvo estas kaj restos la universala kongreso. Tie kreiĝas la vera spirito supernacia kies idea bazo estas la respekto je la nacia lingvo, kaj la estimo por aliaj popoloj. Facile ni Esperantistoj konatiĝas kun la “aliaj” kaj ni mire konstatas ĉiam kiom proksimaj ni ja estas unu al alia, kiam ni parolas en Esperanto. Eĉ la malnovaj Esperantistoj, kutimiĝintaj je universalaj kongresoj, eĉ satigitaj, ĉiam ree konstatas tiun-ĉi senton de leviĝo spirita, en la momento de la malfermo. Estas grava psika fenomeno, ke “artefarita” lingvo, sen kelkcentjara tradicio, sen la atributoj de granda kulturlingvo nacia, kapablas krei tian senton.

Ni kunvenos do en Zagreb, en lando kiu estas kvazaŭ citadelo de nia komunumo. Realigis nun la deziro de multaj inter ni, kongresi foje en la slava sudo: la sorto volis, ke precize en tiu parto de Eŭropo kie Esperanto populariĝis kaj kie oni plej bone sentas la neceson de internacia lingvo, nia movado estas apenaŭ plu tolerata. Supozante normalan situacion, kia manifestacio estus la 38-a kongreso!

Ni iros en landon kun riĉa

pasinteco, kies postsignoj nin ravas. Ni konatiĝos kun popolo luktinta dum jarmilo por vivi propran vivon, por esti “mastroj en propra domo”. En niaj interparoloj kun enlandaj samideanoj ni ne forgesu ke ĉi tiuj landoj konis la militon sub ĉiaj formoj kaj ke necesas ankoraŭ jardeko por malaperigi la sekvojn de la lasta.

La kongresano kiu deziras profiti de la okazo konatiĝi kun la slava sudo ne pentos pasiginte tuton aŭ parton de sia libertempo en tiu-ĉi kontraŝtiĉa lando. Post jaroj oni memoros la 38-an kongreson en Zagreb kaj enhavoriĉajn tagojn pasigitajn en Jugoslavujo.

Hans Jakob.

Internacia Konkurso 1953

Stato je la 31a de majo

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Argentino ..	500	735	147.0
2. Maroko ..	600	695	115.8
3. Aŭstralio ..	900	995	110.6
4. Sudafriko ..	300	310	103.3
5. Germanujo ..	3200	3245	101.4
6. Francujo ..	5200	5255	101.1
7. Nederlando ..	4600	4584	99.7
8. Svislando ..	1450	1440	99.3
9. Aŭstrujo ..	800	790	98.8
10. Italujo ..	2400	2345	97.7
11. Danlando ..	2500	2435	97.4
12. Japanujo ..	900	870	96.6
13. Urugvajo ..	250	240	96.0
14. Belgujo ..	2200	2039	95.1
15. Usono ..	2300	2112	91.8
16. Finnlando ..	2200	1955	88.9
17. Britujo ..	10000	8854	88.5
18. Hispanujo ..	1500	1255	83.4
19. Svedujo ..	5500	4400	80.0
20. Portugalujo ..	600	470	78.3
21. Kubo ..	250	195	78.0
22. Kanado ..	300	225	75.0
23. Norvegujo ..	2100	1485	70.7
24. Islando ..	450	310	68.9
25. Irlando ..	250	165	66.0
26. Novzelando ..	900	550	61.1
27. Jugoslavujo ..	1500	675	45.0
28. Brazilo ..	6500	40	0.6

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Albault-Hachin. Al Ges. Albault-Hachin naskiĝis filo Bertrando je la 5a de junio 1953 (11, rue des Feuillants, Toulouse, Francujo).

Demol-Cafmeyer. Al Ges. M. Demol-Cafmeyer (Torhoutsteenweg 22, St. Andries (Brugge) Belgujo) naskiĝis filino Katrien je la 11a de majo 1953.

Iggers. Al Ges. G. G. Iggers (1118 Izard Street, Little Rock, Ark., Usono) naskiĝis filo, Daniel Philip, je la 11a de aprilo 1953.

Luez. Al Ges. Daniel kaj Annick Luez Del. de UEA en Laon (Aisne) Francujo, naskiĝis filo Bernard, la 22an de majo 1953.

Al ĉiuj ni esprimas sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

Adamson. Mortis la 11an de junio unu el la plej konataj svedaj esperantistoj, Einar Adamson, komitatano kaj sveda ĉefdelegito de U.E.A. Li estis vera idealisto, kiu kun entuziasmo kaj sen timo batalis dum la tuta vivo por siaj ideoj, inter kiuj aparte Esperanto estis lia plej kara.

Antaŭ pli ol 40 jaroj li fariĝis esperantisto kaj jam de la komenco tre aktive partoprenis la movadon.

Li faris dum sia vivo inter 1,000 kaj 2,000 prelegojn pri Esperanto, gvidis amason da kursoj kaj fondis grupojn en multaj partoj de la lando. Pro sia aktiveco li jam en la jaro 1917 fariĝis membro de la estraro de S.E.F. En la jaro 1922 li estis unu el la fondintoj de S.L.E.A., kies prezidanto li estis dum 10 jaroj.

Al U.E.A. li aliĝis en 1911 kaj de tiam restis membro. Kiam U.E.A. kaj I.E.L. kunfandiĝis en 1947 li fariĝis sveda ĉefdelegito de la nova organizaĵo. Sub lia gvido la aktivaj UEA-membroj multobliĝis; li estis konsiderata de nia Centra Oficejo kiel unu el la plej lertaj ĉefdelegitoj de U.E.A.

Sincereco, sinoferemo, bonkoreco kaj idealismo ornamis la karakteron de Einar Adamson, al kio ni devas aldoni, ke li ĉiam plenumis siajn komisionojn en ekstreme prudenta kaj akurata maniero.

E. Malmgren, Prezidanto.

Schmiedeberg. Prof. Johannes, Marburg, Germanujo mortis je la 28a de majo 1953. Fidela subtenanto kaj laboranto dum longa tempo.



Tra la Mondo Esperantista



Belgujo

Beneluksa Kongreso en Antverpeno, Pentekosto 1953. Estis al mi tre agrable ĉeesti, kiel oficiala reprezentanto de U.E.A., la Kongreson aranĝitan en Antverpeno de la Esperantistaj Asocioj de la landoj konataj sub la moto "Benelux".

La preparoj estis zorge aranĝitaj de L.K.K. kiun prezidis S-ro M. Jaumotte, nelacigebla organizanto de la tuta programo. Aliĝis 360 personoj el kiuj 300 efektive ĉeestis.

La Honora Direktoro de nia Centro de Esploro kaj Dokumentado, D-ro I. Lapenna, Estrarano de U.E.A., kun sia kutima elokventeco, informis la ĉeestantojn pri la laboro efektivigita en UNESKO, kaj pri la espero en la frua estonteco.

Dum la malferma kunsido, kiun prezidis D-ro T. Van Gindertaelen, Komitatano de U.E.A., mi mallonge priskribis la rolon de la landaj asocioj en la Esperanto-Movado kaj ilian lokon en la nuna U.E.A. La Ĝenerala Konsulo de Nederlando, S-ro Duco Middelburg, salutis la kongreson en tre flua Esperanto. Ankaŭ parolis reprezentantoj de la tri partoprenantaj asocioj, Flandra Ligo Esperantista, "La Estonto Estas Nia" kaj Reĝa Belga Ligo Esperantista.

Ĉiuj tri Ligoj aranĝis apartan kunsidon, dum kiu ili pritraktis la kutimajn erojn de siaj jaraj kunsidoj. La aliaj aranĝoj estas komunaj.

La kongresanoj estis akceptitaj de la urbestro S-ro Craeybeeckx, kiu

sciigis ke bela avenuo en nova kvartalo de la urbo ricevos la nomon de L. L. Zamenhof.

Balo, dancista kaj teatra prezentado, ŝipekskurso sur la Skeldo, vizitoj k.t.p. plenigis tiujn tri agrablajn tagojn.

Tiu komuna kongreso disvolviĝis en plena harmonio; ĝi donis okazon al la membroj de la tri Ligoj interkonatiĝi kaj jam estas metita la fundamento por pli intima kunlaboro en la estonto. Estas decidite aranĝi duan Beneluksan Kongreson en Lieĝo dum la jaro 1954.

Sendube tiu kunlaboro akcelos la progreson de nia movado en la Malaltaj Landoj kaj signifos pluan plifortigon de nia Universala Esperanto-Asocio. Koran dankon kaj gratulojn, nome de U.E.A., al ĉiuj iniciintoj, aranĝintoj kaj partoprenintoj.

*D-ro P. Kempeneers,
Vic-Prezidanto de U.E.A.*

Fervojistoj

La 16an de aprilo 1953 okazis la 1a jarkunsido de la Belga Esperantista Fervojista Asocio (B.E.F.A.).

Post enkonduka alparolo de la iniciinto, S-ro De Bruyne, D-ro P. Kempeneers, vic-Prezidanto de UEA kaj Prezidanto de la Reĝa Belga Ligo Esperantista, ĉeestante kiel gasto, salutis la multnombre alvenintan kunsidantaron. Li akcentis la valoron de la uzo Esperanto en la fakaj

profesiaj asocioj, kaj deziris al la B.E.F.A. sukcesan disvolviĝon. S-ro Briade, oficejestro kaj delegito de la Nacia Societo de Belgaj Fervojoj, S-ro Stapel, prezidanto de la Internacia Federacio Esperantista Fervojista (I.F.E.F.) kaj delegitoj de diversaj lokaj esperantistaj organizaĵoj esprimis ankaŭ siajn bondezirojn al la nova asocio.

La Kunsido finiĝis per prezentado de filmoj pri la internaciaj Kongresoj de la I.F.E.F. en Aarhus kaj Lindaŭ kaj aŭdigo de Esperantaj kantoj.

Bone provizita Esperanto-stando, starigita en la kunvenejo, konsistigis frapan elmontron pri la amplekso de la Esperantaj literaturo kaj gazetaro.

H. Castel.

Britujo

Proksimume 250 gesamideanoj ĉeestis la 37an Britan Esperanto-Kongreson, kiu okazis en Bournemouth je Pentekosto. Ĝi certe estis inter la plej bonaj britaj kongresoj, kaj oni devas gratuli al la LKK pro elstara sukceso.

La kongresejo estis la urbodomo, bone konata al tiuj kiuj ĉeestis la Universalan Kongreson antaŭ kelkaj jaroj. En ĝi estis poŝtoŭicejo kaj kafejo por la uzo de la delegitoj. Civita akcepto kaj belega balo okazis vendredon vespere, kiam la urbestro bonege regalis la du cent ĉeestantojn. Sabaton okazis diversaj fakkunsidoj kaj bone ĉeestata UEA-kunveno, krom vizitoj al lokaj vidindaĵoj. Vespere okazis varieteo kun tre bona programo, kvankam iomete tro longa !

Dimanĉon okazis la ĉiujara kunveno de BEA, kiam membroj reelektis la oficistojn. Estis multe pli vigla diskuto ol kutime, precipe

rilate al la financa stato de la asocio, kiu tute ne estas kontentiga. Kredeble okazos plialtigo de kotizoj kaj vigla kampanjo por varbi novajn membrojn al la nacia asocio. Posttagmeze okazis Diservo, kiun kondukis S-ro A. J. Hicks, M.A.

Lundo estis tago de ekskursoj, kiuj tre sukcesis speciale pro la belega vetero. En la vespero estis Arta Prezento kun nekutime bona programo. Tiel finiĝis la Kongreso, sed multaj restis en Bournemouth dum la tuta semajno, kaj por tiuj estis aranĝitaj diversaj kunvenoj kaj distraĵoj.

Edinburgh. La Edinburga Esperantista Societo fondiĝis en la jaro 1903 kaj, je la okazo de ĝia jubileo, la anoj decidis donaci al la urbego Edinburgh benkon metotan sur la trotuaron de Princes Street, la ĉefa strato de la urbo.

La urba konsilantaro decidis akcepti ĝin kaj la benkon oni donacis ĉe ceremonio je la 2a de majo. S-ro Robert Mackay, la prezidanto de la societo, en la ĉeesto de Kavaliro Andrew Murray, diris ke ni donas la benkon ne nur por plibonigi la urban belecon, sed ankaŭ por honori la memoron de D-ro Zamenhof kaj de la fidelfortaj pioniroj en Edinburgo. Kavaliro Andrew Murray diris ke li scias la bonan kaj malfacilan laboradon kiun faras la Esperantistoj, kaj ke li antaŭenrigardas al la tempo kiam ĉiu en la mondo parolos Esperanton kiel duan lingvon. Pro la Societo li petis magistratanon James Campbell, ke li akceptu la benkon pro la urbo.

Fino Jane Baird, la honora prezidanto de la Societo, tiumomente forprenis standardon kaj malkovris platon, faritan el bronzo kaj alfiksitan

al la benko, sur kiu estas entrancitaj la vortoj (anglalingve) :

ESPERANTO

Internacia Lingvo

Donacita 1953

por memorfesti la

50an datrevenon

de la starigo de la

Edinburga Esperantista Societo

Magistratano Campbell multe dankis la Societon por la benko, kaj komplimentis ĝin pri kvindek jaroj de progresado, kaj kore deziris al ĝi pluan sukceson.

Grekujo

De nia nelacigebla pioniro D-ro Anakreon Stamatiadis ni ricevis mal-longan raporton pri siaj kursoj oficialaj dum la lerneja jaro 1952–1953.

Li instruis en 14 ŝtataj gimnazioj, en komerca lernejo, en pedagogia akademio, en altlernejo de ekonomiaj kaj komercaj sciencoj, kaj en altlernejo por ŝtataj geinstruistoj, entute al 1244 personoj. Li raportis, ke la intereso de la lernantoj pri Esperanto estas multe pli bona ol iam antaŭe.

Gratulante al D-ro Stamatiadis pro lia bonega laboro por nia movado, ni scivolas ĉu iu alia iam kaj ie instruis la lingvon al tiom da personoj !

Hispanujo

La Esperanto-Grupo de Bilbao—lastatempe laŭleĝe restariĝinta, kun 103 membroj — gastigos la 14an Hispanan Kongreson de Esperanto, de la 7a ĝis la 10a de Aŭgusto. Interalie, anoj de la Hispana Blindula Asocio helpas pri la aranĝoj de tiu kongreso.

Italujo

La mondkonata kudromaŝina fabriko Necchi produktinte

modifitajn formojn de siaj maŝinoj B.F. kaj B.U. oficiale nomis ilin “B.F. Nova” kaj “B.U. Nova”. Plue, ĉe la foiro de Milano aperos plej lasta formo “B.U. Mira”. Gratulojn pro ĉi tiu utiligo de Esperanto oni sendu al Fabriko de Kudromaŝinoj Vittorio Necchi, Pavia, Italujo.

Jugoslavujo

Dum la tagoj de la 4a ĝis la 6a de Majo 1953 restadis en Maribor, nordorienta Slovenio, la K.K.S. S-ro Mason Stuttard, kiu faris propagandan rondvojaĝon tra jugoslavaj urboj. La urbestro solene akceptis lin, ankaŭ gvidantaj aŭtoritatuloj de kulturo kaj klerigo, kaj lokaj ĵurnalistoj intervjuis lin kaj lian edzinon. En la Kleriga Klubo de Laboristoj S-ro Stuttard prelegis pri UEA, universalaj kongresoj, pri la movado en unuopaj landoj, kaj pri la signifo kaj celo de Esperanto kiel lingvo por ĉiu popolo. La prelegoj multe interesis kaj la vizito ĉiel sukcesis.

Norvegujo

Laŭ la jarraporto 1952 de Norvega Esperantista Ligo la membronombro dum la jaro kreskis per 17.5%. Tri eksterlandaj Cseh-metodaj instruistoj, dungitaj de N.E.L., kaj pluraj norvegoj gvidis dum 1952 sume 38 kursojn por komencantoj kun 471 partoprenantoj, kaj 21 daŭrigajn kursojn kun 221 partoprenantoj. 182 personoj lernis per koresponda kurso. La gazetara servo registris dum la jaro 1088 menciojn pri Esperanto en 162 gazetoj. En tiu sama jaro fondiĝis kvar novaj grupoj de N.E.L.

Portugalujo

En la ĉiutaga gazeto “Republica” nia komitatano Saldanha Carreira

aperigas regule kronikon pri Esperanto. La monata gazeto "Natura" enhavas kvar paĝojn pri nia movado, kies redaktoro, samideano Luzo Bemaldo, estas unu el la plej lertaj pioniroj de la portugala movado. Nia ĉefdelegito S-ro José Antunes ĵus publikigis en la bulteno de la Asocio de la Domluintoj verkon en kiu li reliefigas la taŭgecon de Esperanto dum internaciaj kunvenoj.

La movado en nia lando, kvankam iom katenita, sukcesas progresi kontentige. La ĝenerala sento estas, ke la tagon, kiam ni povos malfermi kursojn, la movado fariĝos serioza afero en Portugalujo.

J.A.

La 5-a Fervoja Esperantista Kongreso

La Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj tre sukcese aranĝis sian ĉi-jaran kongreson en Utrecht, de la 5-a ĝis la 10-a de Majo. 400 ĉeestantoj el 12 landoj ĝuis senriproĉe organizitan rendevuon kun varia programo.

En la Malferma Kunsido, la ĝenerala direktoro de la nederlanda ŝtata fervojo, la urbestro de Utrecht, aro da sindikataj kaj Esperantistaj organizaĵoj, inter ili kompreneble ankaŭ UEA, salutis la kongreson. La urbestro de Zwollen, en la subakvigita Zelando dankis por la grandaj monoferoj el eksterlando al la trafita popolo. Fajra kongresparolado de nia nelacigebla ŝatata prezidanto Stapel finis la oratorriĉan feston.

La laborkunsidoj, ĉiam bone vizitataj, postulis preskaŭ du tagojn,

dum kiuj oni faris bonan laboron. Ĉiujare la ĉefestraro povas anonci plian progreson laŭ membronombro. Laŭ la tre plaĉa jubilea gazeto *IFFE-Bulteno*, la organizaĵo nombras 1100 anojn en 18 landoj, dividitaj en 12 landaj organizaĵoj kaj izolaj membroj. Feliĉe la estraro kaj kun ĝi la delegitoj konscias pri la neceso de kunlaboro kun la universala movado kaj decidis unuanime akcepti "kontrakton pri kunlaboro kun UEA", kaj ligan kun SAT, kiel "simpatianta organizaĵo". Nova statuto estis zorge ellaborita en Utrecht.

Por doni al estontaj kongresoj kulturan valoron, ĉiujare elektiĝos temo pridiskutota. Por 1954 ĝi estos "La faka instruado de la fervojistoj", pri kiu la 12 landaj organizaĵoj devos okupiĝi kaj elekti prelegantojn. Tiel ebligis interlandaj komparoj, kiuj estu prezentataj al la fervojaj administracioj kaj sindikatoj. Jen trafa propagando por nia movado. La kongreso de 1954 okazos en Verona (Italujo), kaj la sekvonta en Svislando.

Vizito al granda vagon- kaj lokomotiv-fabrika Spoorwegen, tuttaga ekskurso surŝipa al Amsterdam kaj Alphen ĉe Rejno, filmprezentado pri ĉiuj 5 ĝisnunaj IFEF-kongresoj, arta vespero kaj kabareda vespero, krom postkongresa ekskurso al Nijmegen kompletigis la programon.

Ŝajnas ke nia de lokomotivestroj celkonscie gvidata IFEF bone trovas sian vojon kaj marŝas al pliaj sukcesoj. Jen organizaĵo verdstela, plena de entuziasmo, daŭre evoluiganta kaj bonekzempla por ĉiuj ceteraj.

O.W.

La Londona Klubo jubileas

LA Londona Esperanto - Klubo fondiĝis la 12an de januaro 1903. Malgranda aro kunvenis en la oficejo de la redaktoro de *Review of Reviews*, la mondkonata W. T. Stead, kiu fariĝis la unua kluba kasisto. La unua sekretario, H. Bolingbroke Mudie, pro sia posta laboro por U.E.A., ankaŭ fariĝis mondkonata en la movado. La Klubo servis la tutan Britujon sed en Oktobro 1904 decidis fondi la Britan Esperantistan Asocion kaj dediĉi sin aparte al Londono. Simile al multaj tiamaj kulturaj societoj, ĝiaj kunvenoj konsistis el neformala babilado sekvata de formala kunveno laŭ presita programo de prelegoj, koncertoj teatraĵoj kaj aliaj distraĵoj. Senhalte, ĉiusemajne tra la duonjarcento ĝi tiel kunvenis, eĉ dum Londono estis bombardita dum la du mondmilitoj. Pro tio ĉiam troviĝas parto de Esperantujo en la granda metropolo kiun alilandanoj kaj provincanoj egale kiel Londonanoj vizitis kun intereso kaj ĝojo sciante, ke oni bonvenigos kaj paroligos ilin. En tia rondo fariĝis gvidantoj de la movado kaj centoj da modestaj entuziasmaj laborantoj.

Aldone al ĝia konstanta provizo de programoj, la klubo ĉiam pretis entrepreni grandajn taskojn. Ekzemple, post la tria U.K., ĝi aranĝis la gastigon de D-ro Zamenhof en la historia Guildhall; post la Oksforda Kongreso en 1930 ĝi aranĝis postkongreson de pli ol 300 el multaj landoj; en 1938 ĝi ludis gravan rolon en la gastigo de la U.K. en Londono; kaj en 1949, 565 partoprenis ĝian brilan antaŭkongreson.

Laŭ la sama tradicio estis organizita la kvinĝaga festo de ĝia Ora Jubileo, je Pasko. En bele ornamita klubejo, la vigla koniĝa vespero donis provgustumon. Je la inaŭguro, S-ro Malmgren formale malfermis la feston en la ĉeesto de la Estraro de U.E.A. S-ro Hans Jakob ankaŭ salutis por U.E.A. Sprite parolis S-ro W. H. Browne pri pioniraj propagandaj kunvenoj en la freŝa aero, kie oni devis superruzi la lertan ŝercemon de la Londonanoj. Kuraĝige, por la junularo S-ino Elsa Rapley parolis pri la estonteco, kaj S-ino Nora Holmes pri la sinjorina laboro en la klubo. S-ro Frank Merrick, klubano, majstre pianludis. D-ro Ivo Lapenna, ankaŭ klubano, faris la festan oratorajon.

La Londona Klubo prave famiĝis pro kabaretoj, pantomimoj kaj bonhumoraj teatraĵoj kiuj trafe montras la taŭgecon de Esperanto por internacia ŝercado. La Ora Jubileo atingis la ĝisnunan plej altan pinton de la reĝisora arto de Ken Alexander, kaj la tuja ridado de la aŭdantaro pro rapide movantaj ŝercaĵoj atestis pri ilia lingva kapableco.

Dum la belarta vespero, Reto Rossetti tiel instige prelegis pri nia literaturo, ke oni ne plu miris ke la Londonanoj emas aĉeti librojn. Poste, li kaj Eric McCanlis denove tiklis nian apetiton per deklamado. La salutparoloj kaj leteroj el multaj landoj montris la sukceson de la festo kaj la popularecon de la klubo.

Kiel kutime en klubaj aranĝoj, dum ĉiu tago okazis ekskursoj—en la parlamentejon kaj al la multaj



Sceno en la teatraĵeto

Roluloj : M. C. Major, J. Beasley, E. McCanlis, Irene Nuthall, Elsa Rapley

vidindaĵoj de la urbego—kiujn gvidis oficiala kaj klubana gvidisto, S-ro Pike.

La balo, estrita de S-ro W. A. Gething, estis aparte gaja pro la diverslandaj popoldancoj kaj la kostumoj de la Internacia Popoldanca Societo.

S-ro H. W. Holmes, kiu dum 20

jaroj estas Prezidanto de la Klubo, en sia prezidanta parolado aludis al la graveco de kluboj kaj grupoj kiuj formas le terenon de Esperantujo. Lingvo vere vivas kiam ĝi estas parolata, kaj dum ekzistas societoj kiel la Londona Klubo, kie la anoj preferas paroli Esperanton kaj parolas ĝin bone, realiĝas la fervora krio, “Vivu Esperanto”.

Notoj de la Redakcio

1. La prijubilea artikolo “25-50-75” en la Maja numero de *Esperanto* enhavis korektindan eraron. La iniciatinto de la monumento en Wörgl ne estis nia Hofrat Steiner, sed samideano Hans Steiner en Wörgl, helpata sindone de la unua.

Plie, kiel trian iniciaton entute dankatan al Hofrat Steiner ni citu la Konstantan Ekspozicion de Esperanto en la Hofburg, Imperiestra Kastelo, Vieno.

2. La desegnaĵoj por illustri la artikolon “La homo kaj la aŭtomobilo” en la Maja numero estas bonvole disponigitaj al ni de s-ro Esbjörn Stridell, Svedujo, al kiu ni sincere dankas.

3. En la artikolo “Nia membraro” en la Marta numero okazis eraro pri la statistiko por Usono. La nombro da AM en tiu lando en 1952 ne estis 398 sed 456. Ni pardonpetas pro la eraro.

La rolo de Landaj Asocioj en la Tutmonda Esperanto—Movado

DUM la unuaj jaroj de nia agado ne ekzistis organizita movado. Dek jarojn post la apero de Esperanto ekzistis en la mondo kvin Esperantistaj kluboj: en Nürnberg, Petrograd, Odessa, Uppsala kaj Louhans (Francujo).

En 1898 de Beaufront anoncis la starigon de "Société pour la propagation de l'Esperanto"; en la komenco ĝi estis internacia, sed en la jaro 1903 ĝi fariĝis "Société française pour la propagande de l'Esperanto" (Societo franca por la propagando de Esperanto).

En 1903 ankaŭ fondiĝis Svisa Esperanto-Societo; en 1904 Brita Esperantista Asocio en 1905 Belga Ligo Esperantista kaj Nederlanda Esperanto-Asocio L.E.E.N. Sinsekve propagandaj societoj estis starigitaj en multaj landoj.

En tiu sama jaro 1905 okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto. La gvidantoj el la diversaj landoj renkontiĝis por la unua fojo: ili diskutis la demandon pri ĝenerala organizo de la Movado. Ili dividiĝis en du partiojn: unu partio deziranta fortan centrigitan organizon, alia parto deziranta minimumon da organizo por lasi plenan liberecon al ĉiuj privataj agadoj. Pro tio la demando ne ricevis kontentigan solvon kaj la partianoj de organizo nur sukcesis krei du organismojn: Lingvan Komitaton kaj Organizan Komitaton por organizi la sekvontajn Kongresojn.

La Prezidanto Generalo Sebert, deziris ke la komitatoj havu sidejon

kaj li luis la fame konatan oficejon 51 rue de Clichy, Parizo, en kiu laboris Gabriel Chavet. Tie dank' al malavara subteno de Generalo Sébert kaj de D-ro Javal farata granda laboro, kaj amasiĝis multaj libroj kaj dokumentoj kiuj nun ripozas en la Biblioteko de la Komerca Ĉambro de Parizo.

Dume en la jaro 1908 fondiĝis Universala Esperanto-Asocio. La naciaj societoj celis propagandon por Esperanto kaj varbadon de novaj Esperantistoj; la nova Asocio celis disvolvigi la praktikajn aplikojn de la lingvo. Ĝi rapide kreskis kaj dum la milito 1914–1918 efektivigis grandegan laboron starigante servon al civilpersonoj internigitaj en militantaj landoj, per transigo de korespondaĵoj, mono, nutraĵoj.

Post la milito sentiĝis pli kaj pli bezono de kunlaborado inter ambaŭ branĉoj de la movado, propaganda unuflanke, praktika aliflanke. Post diversaj klopodoj, nova organizaĵo konkretiĝis en la Kontrakto de Helsinki (1922).

Oni kreis Konstanton Rezentantaron de la naciaj societoj, konsistantan el reprezentantoj de la propagandaj societoj. Tiu Konstanta Rezentantaro kun la Estraro de Universala Esperanto-Asocio, elektis Centran Komitaton, konsistantan el 6 diversnaciaj membroj. Tiu Centra Komitato, poste nomita Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, reprezentis por la ekstera mondo la Movadon, organizis la Kongresojn, k.t.p.

Tiu kontrakto celis harmoniigi la

laboron de ĉiuj organizaĵoj sed havis mankojn, kiuj kaŭzis malkonsentojn. Ne estas utile rememorigi la diversajn klopodojn por atingi la deziritan solvon, kiu efektiviĝis en la jaro 1947. Post multaj jaroj, ni povis meti la finan punkton al tiu ĉapitro: “organizo de la Esperanto-Movado” kaj uzi niajn fortojn por pli utilaj klopodoj.

Laŭ la nuna statuto, unu el la celoj de Universala Esperanto-Asocio estas zorgi pri la kunagado de la Esperantistaj organizaĵoj. En ĝi tute apartan lokon okupas la Landaj Asocioj. Por akcenti la geografian kompetentecon oni donis tiun titolon al tio, kion oni antaŭe nomis “naciaj societoj”.

Laŭ la statuto povas aliĝi al Universala Esperanto-Asocio landaj asocioj kun minimume 100 membroj. Ili elektas komitatanojn, proporcie al la nombro de siaj membroj: unu de 200 ĝis 1000 membroj kaj unu plian por ĉiu komencita milo.

En la Komitato dum la periodo 1953–1956 estos 27 Komitatanoj elektitaj de la Landaj Asocioj, 4 elektitaj de la delegitoj, kaj povos esti sep alelektitaj Komitatanoj. La Komitato de U.E.A. en la nuna organizformo prezentas sintezon de du principoj: kolektiva (landaj asocioj) kaj individua (individuaj membroj kaj delegitoj) kun pli da graveco por la landaj asocioj, kiuj ja estas la vertebraro de la Movado.

Kiam la Estraro de U.E.A. kun ĝojo konstatis ke la organiza problemo malaperis el ĝiaj celoj, ĝi konsideris kiel unu el siaj plej gravaj laŭstatutaj taskoj, zorgi pri la kunagado inter la diversaj instancoj de la Movado, kaj la rilatoj kun la landaj asocioj estis unu el la ĉefaj punktoj.

La Estraro rimarkis ke la kontaktoj kun la landaj asocioj estis maloftaj kaj ke nur dum la Universalaj Kongresoj estis okazo por la reprezentantoj de la Landaj Asocioj interkonatiĝi kaj interrilati kun la Estraro kaj la Ĝenerala Sekretario por preparoli kun ili diversajn aspektojn de la Esperanto-Movado.

La kunsidoj de la Komitato okupis tre—tro . . .—multan tempon; ili havis tre ampleksan tagordon; pri la diversaj pritraktotaj punktoj preskaŭ neniu estis informita. Rezultis el tio ke decidoj estis alprenitaj kvazaŭ hazarde, kaj ne estis eble ke la komitatanoj vere interesiĝu pri la funkciado de la Asocio. Dum la lastaj jaroj la Komitato elektis inter si komisionojn, kiuj dividis la diversajn punktojn pritraktotajn. Tiamaniere ĉiu afero estis pristudata de malgranda grupo de komitatanoj, kiuj specialiĝis pri kelkaj problemoj kaj proponis al la Estraro diversajn solvojn.

Tiel unua paŝo estis farita; la Komitatanoj kiuj reprezentas la Landajn Asociojn jam pli funde konas diversajn aferojn; ili povos informi pri ili la Landajn Asociojn kaj atingi pli bonan komprenon de tiuj problemoj inter la gvidantoj de tiuj Asocioj.

La Estraro de U.E.A. kredas ke tiu kunlaborado kun la Komitatanoj iom post iom povus okazi dum la tuta jaro. Bedaŭrinde mankas ĝis nun teknikaj rimedoj necesaj por organizi tiun kunlaboradon. Tamen ĉiu Estrarano forte deziras ke la komitatanoj interrilatu kun li pri la aferoj rilatantaj al sia fako.

Tiu manko de teknikaj rimedoj ankaŭ estas kaŭzo, ke la kunlaborado de la Landaj Asocioj kun U.E.A.

dum longa tempo ne estis perfekte kontentiga.

Tion kaŭzas ankaŭ plejparte la fakto ke la Komitatano kiu reprezentas Landan Asocion en la Komitato de U.E.A. estas preskaŭ ĉiam okupita pri enlandaj aferoj; tio estas stato dependa nature de homoj pretaj labori kaj en tiu ĉi direkto la Landaj Asocioj devus zorgi eduki novajn aktivulojn por kompensi eksigon, eliron aŭ forpason de aginta aktivulo. Tio estas grava problemo.

Ni ja bone scias, ke la Landaj Asocioj havas siajn proprajn problemojn, kaj ke la administrado de ilia membraro jam postulas grandan sinoferon de iliaj gvidantoj, kiuj plejparte efektiviĝas tiun senripozan laboron dum siaj liberaj horoj.

Estas jam multe. . . . Se nun venas U.E.A. kun novaj postuloj, kiuj plej ofte ne aspektas tiel rekte necesaj aŭ eĉ utilaj, la Landaj Asocioj ofte ne trovas la materiajn rimedojn—tempon kaj laborfortojn—por fari la petitan laboron.

La Estraro de U.E.A. kaj ĝia Ĝenerala Sekretario havas alian pli vastan perspektivon de la Movado. Ili ofte konstatas, ke sukceso en unu lando preparas sukceson en aliaj landoj sur la sama kampo. Ili konsilas, ne ordonas, ili estas pretaj helpi se eble, ili celas nur la bonon de la afero kaj la progreson de Esperanto.

Plej bona pruvo pri la utilo de koordinita laboro estis la sukceso akirita en UNESKO. U.E.A., pere de la prezidanto, la Unesko-komisiito kaj Prof. Lapenna, faris konsilojn kaj proponojn pri la taktiko en la diversaj landoj.

El tio rezultis, ke la gvidantoj de pluraj landaj asocioj estis kuraĝigitaj kaj riskis sin turni al siaj registaraj instancoj. U.E.A. provizis ilin per la necesaj dokumentoj kaj la respondecaj personoj favore estis influataj. Veninte al Parizo, per tiu favora sinteno ili plifaciligis la laboron de niaj delegitoj, kaj la svisa delegitaro povis prezenti la faman rezolucion, kiu malfermas al ni novajn esperojn.

La moderna tekniko postulas koordinitan laboron de la diversaj elementoj. Tion ni nun organizas ankaŭ en nia movado por ke nia laboro estu kiel eble plej efika.

La Landaj Asocioj reprezentas la Internacian Movadon en sia propra teritorio. Kiam ili tion bone komprenos ĉies laboro estos multe pli facila kaj efika. La kondiĉo de sukceso estas: firma kredo je la boneco de la afero; disciplino en la agado.

Ni ne forgesu la devizon “Unueco estas forto”.

*D-ro P. Kempeneers,
Vic-Prezidanto de U.E.A.*

KOMERCAJ LETEROJ

C. W. Pruissen

Kiel verki bonajn leterojn, kun multaj trafaj ekzemploj.

64 paĝoj. 2ŝ. 2p. (7 rpk.) afrankite

Mendu ĉe enlanda libroservo
aŭ ĉe

Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo



38-a Universala Kongreso de Esperanto

25 julion—1 aŭguston, 1953

Poŝtfako 213, Zagreb, Jugoslavujo

Banka konto : Narodna banka, Zagreb, no. 402-T-844

N-ro 8

OFICIALA KOMUNIKO

Junio 1953

Kongresa Libro : Je la momento de kompilo de la jena komuniko la Kongresa Libro estas en la presejo. Certe kiam ĝi aperos la libro estos preta kaj sendita al ĉiu kongresano. Kiu ne ricevis ĝin turnu sin al L.K.K.

Oficiala invito : La direkcio de “Rade Konĉar” la plej granda fabriko en Kroatujo invitas grupon da kongresanoj viziti ĝin, probable merkredon matene de la kongresa semajno. Temas pri fabriko de malpeza industrio. Interesatoj nepre sin anoncu por ke preparoj estu farataj.

Ankoraŭ vizito : Povas esti ke iuj kongresanoj, precipe instruistoj, volos profiti viziton al la Infana Urbo apud Zagreb. Interesatoj sin turnu kiel eble plej baldaŭ al L.K.K. por ke ĝi faru preparojn. Manke de montrita intereso L.K.K. nenion preparos.

Junulara programo : Malgraŭ aliĝo de multaj gejunuloj kaj infanoj, kaj malgraŭ peto de L.K.K. ke oni anoncu sian intereson por speciala infana programo, eĉ ne unu junulo sin anoncis. Sekve L.K.K. ne povas nun prepari specialan infanan programon por la kongreso.

Instruista kunveno : Speciala kunveno por la fondo de enlanda asocio de instruistoj-esperantistoj okazos dum la kongreso en la societejo “Bude Borjan”. Anonco aperos kun la kongresaj dokumentoj.

Fervojistoj : Faka kunveno de esperantistoj-fervojistoj okazos en la societejo “Bude Borjan” dum la kongresa semajno. Detaloj kun la kongresaj dokumentoj.

Statistiko : Argentino 1, Aŭstralio 1 Aŭstrujo 54, Belgujo 9, Brazilo 3, Britujo 113, Danlando 60, Finnlando 9, Francujo 171, Germanujo 90, Eburua Bordo 4, Gvatemalo 1, Hispanujo 1, Italujo 21, Izraelo 1, Jugoslavujo 584, Maroko 1, Nederlando 38, Norvegujo 27, Novzelando 3, Polujo 1, Portugalujo 1, Sarlando 1, Svedujo 170, Svislando 29, Turkujo 1, Usono 5. Sume 1400 el 27 landoj (pasintjare 1258 el 31 landoj).

*Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.*



Marŝalo Tito, Esperantisto !

La Prezidanto de Jugoslavujo akceptas esperantistan delegitaron

LA 4-an de junio 1953 je la 10-a horo matene en la Blanka Palaco, Beograd, Marŝalo Tito, Prezidanto de Jugoslavujo, akceptis S-ron Mason Stuttard, Konstantan Kongresan Sekretarion, D-ron Ivo Borovečki, prezidanton de L.K.K. kaj de Jugoslavia Esperanto-Federacio, D-ron Vuko Jovanović, komitatano de U.E.A. kaj S-ron Peter Zlatnar, prezidanton de Slovenia Esperanto-Ligo.

La ĉefa celo de la aŭdienco estis prezento de S-ro Stuttard, kiel tradukinto de la fame konata verko de Vladimir Dedijer en Esperanton.

Parolante en Esperanto S-ro Stuttard esprimis dankon al Marŝalo Tito pro la granda favoro akcepti la delegitaron, kaj parolis iom detale pri la traduko de la biografiaj notoj de Dedijer.

Je la fino Marŝalo Tito diris **en Esperanto** : “Mi ĉion komprenis. Mi lernis Esperanton en la malliberejo !” Poste li klarigis ke li multon forgesis kaj ne povas paroli en la lingvo, sed ke se oni parolas malrapide li bone komprenas.

Post tio la aŭdienco jam ne havis oficialan formalan karakteron, sed evoluis en atmosfero de amikeco kaj intimo.

D-ro Borovečki salutis Marŝalon Tito en la nomo de S-ro Ernfrid Malmgren, prezidanto de U.E.A. kaj en la nomo de U.E.A. kiel ĝia komitatano kaj dankis la Prezidanton pro la grava morala kaj financa helpo, kiun la ŝtato jam donis al la kongreso okazonta en Zagreb.

D-ro Jovanović salutis nome de la serbaj kaj beogradaj esperantistoj,

kaj S-ro Zlatnar en la nomo de la jugoslavaj kaj precipe la slovenaj esperantistoj.

Marŝalo Tito bonvolis akcepti donacon de sep esperantistaj libroj, kiujn S-ro Stuttard prezentis al li kaj dankante pro la donaco komentis—esperantlingve—“Mi legos ilin”.

En la posta diskuto Marŝalo Tito montris sin bone informita pri la kongreso kaj parolis tre favore pri Esperanto ĝenerale, emfazante la la gravan rolon kiun povus ludi la Internacia Lingvo en internacia kunlaboro. Li aparte akcentis la gravecon de Esperanto por la laboristoj de la mondo.

Laŭ la opinio de la ĉeestintaj delegitoj Marŝalo Tito estis pli elokventa pledanto por la ideo de Internacia Lingvo ol multaj esperantistoj mem ! Li tamen insistis, ke la grandskala enkonduko de Esperanto, kvankam necesa, devas ne esti farata laŭ dekreto de supre, sed sekve de la premo de informita publika opinio laŭ demokrata maniero.

Ne eblas sufiĉe emfazi la gravecon de ĉi tiu aŭdienco por la esperanto-movado, ne nur en Jugoslavujo mem, sed en la tuta mondo. Tiu verŝajne estis la unua fojo en la historio, je kiu ŝtatestro akceptis delegitaron de esperantistoj. Krome Marŝalo Tito verŝajne estas la sola ŝtatestro, kiu parolas Esperanton. Liaj diroj kaj komentoj favore al la enkonduko de Esperanto devus trovi vastan eĥon tra la mondo kaj cetere servas por illustri ankoraŭfoje la grandan simpatian kiu ekzistas en Jugoslavujo por Esperanto.

D-ro Ivo Lapenna :

Grava Pliboniĝo de Nia Informado

EN “Esperanto” de Julio 1952 aperis serio da artikoloj kun detalaj informoj pri la organizo de nia tuta informa laboro kaj kun konsiloj pri la enhavo kaj formoj de formoj de bona informado rilate Esperanton. Tiu ampleksa materialo servis kiel bazo de diskuto en la kunveno de la reprezentantoj de informaj fakoj en Oslo. La kunveno okazis la 8-an de Aŭgusto 1952 kaj ĝin ĉeestis 46 personoj. La informaj fakoj de la sveda, franca, itala, dana kaj norvega landaj asocioj sendis siajn reprezentantojn. Post tre altnivela diskuto la kunveno aprobis la ideojn esprimatajn en la menciitaj artikoloj kaj rekomendis al la informaj fakoj de la landaj asocioj kaj al ĉiuj personoj, kiuj okupiĝas pri la disvastigo de Esperanto, atenti tiujn konsilojn. Koncerne la komunan devizon, la kunveno decidis rekomendi la utiligon aŭ de unu el la devizoj publikigitaj en la Julia numero de “Esperanto”, aŭ de la devizo, kiun uzas la Sveda Esperanto - Federacio. Oni tiam konstatis, ke ne estas eble uzi la saman devizon en la tuta mondo, ĉar la cirkonstancoj diferencas de unu lando al la alia. Tial la kunveno konsilis elekti devizon, kiu pleje respondas al la spirito de la koncerna lando aŭ speciala medio. Ĉe la fino de tiu kunveno la reprezentanto de la Sveda Esperanto-Federacio, s-ro Strönné, dankis al la gvidanto de la Informa Fakoj de UEA pro la laboro farita sur tiu kampo kaj esprimis sian fidon, ke ĉiam pli oni agos laŭ la sugestoj de la Informa Fakoj de UEA por prosperigi la Movadon.

Tiamaniere la principoj, sugestoj kaj konsiloj, entenitaj en la Julia numero de “Esperanto”, fariĝis bazo de nia agado sur la kampo de informado.

I. Laboro de la Informa Fakoj de UEA

Pro manko de financaj rimedoj, la Informa Fakoj de UEA ne povas mem eldonadi informan materialon, organizadi ekspoziciojn, okazigadi prelegojn k.s. Ĝia aktiveco limiĝas al organizado de la tuta informa laboro, harmoniigo de la klopodoj, donado de konsiloj kaj helpo. En la kadro de tiuj eblecoj la Informa Fakoj de UEA realigis en la pasinta laborjaro jenajn taskojn, antaŭviditajn en la plano :

(a) *Organizo de informaj servoj.*—Granda atento estis donita al tiu demando. Ĝenerale oni povas konstati tre kontentigan progreson. Se antaŭ 2 jaroj ni havis nur 4–5 informajn servojn de la landaj asocioj, hodiaŭ ni havas minimume 21. Krom la informaj fakoj menciitaj en la tabela trarigardo (vidu p. 226–7), funkcias ankaŭ la informaj fakoj de la belga kaj germana landaj asocioj.

(b) *Informado al neesperantistaj kongresoj.*—La Informa Fakoj plurfoje atentigis la landajn asociojn pri tiu grava laboro. Nur la sveda kaj la portugala landaj asocioj utiligis la ideon kaj disdonis tiucele kunmetitan leteron en diversaj naciaj lingvoj al membroj de neesperantistaj kongresoj. La Nederlanda Scienca Asocio ekinteresiĝis pri la afero, sed ne donis al ĝi sekvon. La Itala Informa Fakoj antaŭ nelonge petis la tekstojn kaj promesis ekagi ankaŭ sur tiu kampo.

(c) *Livero de artikoloj.*—Al ĉiuj landaj asocioj kaj al diversaj kunlaborantoj de CED estis senditaj 3 artikoloj kun la peto, ke la ricevantoj traduku ilin en la naciajn lingvojn kaj aperigu en la nacilingvaj gazetoj kaj revuoj. La artikolo de la subskribinto sub la titolo “UNESKO diskutas pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj” aperis entute en 132 gazetoj kaj revuoj de 10 landoj. Parta raporto pri tio aperis en la Februara numero de “Esperanto”. La dua artikolo temis pri la rezulto atingita ĉe UNESKO kaj ĝi aperis entute en ĉ. mil gazetoj de 14 landoj, interalie en ĉ. 100 finnaj kaj ĉ. 70 svedaj gazetoj. La artikolo de Prof. Privat sub la titolo “Oni reparaĵas Esperanton” aperis ĝis nun en 14 gazetoj kaj revuoj de 5 landoj. Ĉar montriĝis, ke tiu formo de helpo al la informaj fakoj de la landaj asocioj estas tre utila kaj rezultodona, la Informa Fakoj de UEA liveras ankaŭ estontece tiaspecajn artikolojn al la landaj informaj fakoj kaj al la kunlaborantoj de CED.

(d) *Aliaj artikoloj.*—La Informa Fakoj klopodis observi la ĉefajn tendencojn en la nacilingva gazetaro pri la problemoj de komuna lingvo. En multaj individuaj leteroj ĝi donis konsilojn al la kunlaborantoj en diversaj landoj kiamaniere reagi. El la rektaj intervenoj estas menciindaj tiuj en “Nederlands Juristenblad” (Nederlando), en “Education Nationale” (Francujo) kaj en “Bulletin NGO” (Belgujo).

(e) *Propagandaj vojaĝoj kaj prelegoj.*—D-ro Marek Wajsblum, kunlaboranto de CED, estis plurajn semajnojn en Islando, kie li gvidis kursojn kaj faris prelegojn. Lia vojaĝo estis organizita de UEA kaj

de la Islanda Federacio. Speciala raporto pri lia tiea agado aperos en nia revuo. La verkinto persone faris kelkajn prelegojn, ekzemple en Uddevalla (Julio 1952) en Svedujo, en Bologna (Septembro 1952) en Italujo, en Bournemouth kaj Leicester (Britujo), en Rotterdam (Nederlando) kaj Antverpeno (Belgujo).

(f) *Informa laboro okaze de la UNESKO-Konferenco.*—Kvankam la laboro efektivigita okaze de la UNESKO-Konferenco en Novembro-Decembro pasintjara apartenis al la taskoj de CED, tamen ĉi tie estas menciinde, ke ĝi havis ankaŭ gravan informan rolon. La dokumento CED/3 estis disdonita al ĉiuj delegitoj de la Konferenco. En kunlaboro kun UEF estis organizita en Parizo la 28-an de Novembro 1952 demonstra debatvespero por la membroj de la UNESKO-Konferenco. Tiun aranĝon, kiu havis grandan valoron ankaŭ el pure propaganda vidpunkto, ĉeestis ĉ. 70 delegitoj, vicdelegitoj kaj oficistoj de UNESKO (vidu la raportojn en la revuo “Esperanto” de Decembro 1952 p. 344 kaj de Januaro 1953 p. 10).

II. *Laboro de la informaj fakoj de la landaj asocioj*

En aparta tabela trarigardo estas prezentitaj la ĉefaj rezultoj, kiujn atingis la informaj fakoj de niaj asocioj en diversaj landoj. Estas menciinde, ke la publikigitaj ciferoj prezentas aŭ tute precizajn informojn aŭ proksimuman takson, prefere malaltan. Krome, kelkaj informaj fakoj ne respondis al la demandaro kaj tute certe ankaŭ ekster la organizita laboro sur tiu ĉi kampo aperis en diversaj landoj artikoloj, okazis ekspozicioj, prelegoj ktp. Sekve, la publikigitaj ciferoj devas

esti konsiderataj kiel minimumaj. Kompreneble, en la trarigardo troviĝas informoj nur pri la rekte propagandaj aranĝoj. En la rubriko prelegoj, ekzemple, temas nur pri nacilingvaj prelegoj, en kiuj estas pritraktita la afero de la Internacia Lingvo. Same tiel en la rubriko radio-prelegoj temas pri prezentado de Esperanto per radio kaj ne pri la Esperantlingvaj elsendoj. Evidente diversaj Esperantaj aranĝoj, ekzemple internaciaj kongresoj kaj konferencoj, naciaj aŭ landaj kongresoj, Esperantlingvaj radio-elsendoj k.t.p. havas ankaŭ grandan manifestacian valoron, sed ili ne estas prenitaj en konsideron ĉe la kunmeto de la trarigardo.

Diversaj informaj fakoj aplikis ankaŭ aliajn metodojn de informado. Jen la ĉefaj :

La Brazilia informa fako sendis specialan cirkuleron al 2.000 gimnazioj en la tuta lando pri konkurso de Esperanto por gimnazianoj.

La Brita Asocio komisiis s-ron Butler prelegi en lernejoj kaj li tion konstante faras.

La Flandra informa fako organizas varieteajn vesperojn kun profesiaj artistoj. Okazis tri tiaj vesperoj. Dum la paŭzo oni faras paroladon pri Esperanto. La programoj enhavas multajn informojn pri Esperanto. Eĉ la financa rezulto estas tre kontentiga.

La Hispana asocio raportas, ke nuntempe la radiostacioj de Madrid, Tarrasa, Manresa, Reus, Alerta de Valencia regule informas pri Esperanto aŭ instruas la lingvon. Multaj afiŝoj kaj poŝtkartoj estis eldonitaj okaze de la landa kongreso.

La Itala informa fako eldonas monatan informilon "Notiziario

Internazionale", kiun ĝi sendas al 800 gazetoj kaj revuoj. Ĝi ankaŭ sendas en itala traduko al diversaj revuoj studojn, aperintajn originale en Esperanto. La kondiĉo estas, ke la revuo menciu "tradukita el Esperanto". En pluraj urboj la grupoj aranĝis konstantajn reklamtabulojn en videblaj lokoj.

La Jugoslavaj informaj fakoj aranĝas dum la tuta jaro elmontrofenestrojn kaj vitrinojn en diversaj urboj (en Kroatujo 31).

La Nederlanda asocio okazigis diversajn pergazetajn kursojn. Tiaj kursoj okazis en Zaandam, Purmerend, Bussum kaj Winschoten. Entute partoprenas ĉ. 1.000 personoj, dum la aliaj abonantoj regule legas ion pri Esperanto.

La Norvega informa fako sukcesis, pere de sia gvidanto s-ro Sellin, igi diversajn gravajn organizaĵojn kaj instituciojn alpreni rezoluciojn, favorajn al instruado de Esperanto en la lernejoj.

La Asocio de Esperantistoj en Pollando ne povis respondi al la demandaro, sed donis tre interesajn kaj kuraĝigajn informojn pri sia agado malgraŭ la tre malfavoraj cirkonstancoj. Ne povante aperigi priesperantajn artikolojn, la Asocio limigas sin al presigo de pagataj anoncetoj en provincaj gazetoj pri la koresponda kurso. La rezulto estis, ke 517 personoj petis informojn pri la kurso. Entute 114 personoj aliĝis kaj sekvis la kursojn. Tri vesperaj kursoj okazis en Varsovio kaj unu (60 gelernantoj) en Vroclavo.

En Saarlando la interesiĝo pri Esperanto kreskis precipe pro la fakto, ke la tiea registraro eldonis Esperantan broŝuron pri la centa

kunveno de la Parlamento. Ĉiuj gazetoj kaj la radiostacio raportis pri tiu fakto.

La Sveda Federacio sendis al ĉiuj parlamentanoj la informan numeron de la federacia gazeto. Ĝi ankaŭ aranĝis prelegseriojn kun pretaj intervjuoj kaj bildoj por la gazetaro.

La supraj ideoj, sukcese realigitaj de kelkaj informaj fakoj, estas certe realigeblaj en tiu aŭ en simila formo ankaŭ en la aliaj landoj. Pli detalajn informojn oni povas ricevi rekte de la koncernaj informaj fakoj je la publikigitaj en la tabela trarigardo.

III. *Generalaj rimarkoj*

Kun ĝojo kaj fiero ĉiu esperantisto povas konstati, ke nia informado estas hodiaŭ multe pli organizita, pli intensa kaj pli altkvalita ol en la antaŭaj jaroj. La harmonia kunlaboro inter la Informa Fakoj de UEA kaj la informaj fakoj de la landaj asocioj jam donis vere kontentigajn rezultojn ne nur koncerne la kvanton, sed ankoraŭ pli koncerne la kvaliton de la informado. Kvankam estas tie kaj tie ankoraŭ troveblaj elementoj de malnovaj metodoj, tamen ĝenerala pliboniĝo estas sendube konstatebla ĉie. Koncerne la enhavon de nia informado la ĉefa pozitiva rezulto estas, ke ni ne plu diskutas pri tio ĉu la Internacia Lingvo “estas ebla” kaj kial “ĝi estas ebla”, sed tute simple ni prezentas la rezultojn atingitajn per kaj en Esperanto. Ankaŭ estontece ni devos iri laŭ tiu ĝusta vojo.

La publikigitaj rezultoj rilatas al la jaro 1952. Ĉio indikas, ke la jaro 1953—precipe pro la rezolucio de UNESKO—estos ankoraŭ pli kontentiga. Estas la devo de ĉiuj esperantistoj agantaj sur la kampo

de informado kaj de disvastigo de la Internacia Lingvo ankoraŭ pli streĉi fortojn por ekspluati ĝis la plej alta grado la senduban kreskon de la interesiĝo pri Esperanto preskaŭ en ĉiuj landoj. Unu el la informaj fakoj skribis: “La ĝenerala situacio en nia lando estas nun bonega por Esperanto, sed la esperantistoj ne sufiĉe eluzas la objektivajn eblecojn por la disvastigo de Esperanto.” Ŝajnas al ni, ke tiu ĉi bedaŭrinda vero rilatas al multaj landoj. Tiu stato estas ŝanĝenda. Tiucele estas necese mobilizi absolute ĉiujn pozitivajn fortojn de la Movado kaj dediĉi *egalan atenton* al informado, al instruado kaj al kultura enhavo de la societa vivo. Nur la harmonia kunligo de ĉiuj tri branĉoj de nia aktiveco povas doni vere gravajn rezultojn. Kiam ni atingos ankaŭ tion, ni povos trankvile aserti ke ne nur la interesiĝo por Esperanto kreskis—kiel ĝenerale diras la raportoj—sed ke ni ankaŭ utiligis tiun novan interesiĝon por amasa kreskigo de la nombro de personoj kiuj parolas la Internacian Lingvon.


Pri Digoj (*de paĝo 234*)

multekosta estas la senĉesa zorgado kaj konservado de la tuto. Granda armeo da laboristoj: fosistoj, teknikistoj, inspektoroj kaj inĝenieroj trovas sian ĉiutagan laboron en tiu digoflegado. *Hidraŭliko*—“akvokonstruado” estas la laŭvorta traduko de la nederlanda nomo por tiu fako—estas unu el la plej streĉaj metioj. En senĉesa, paca batalo kontraŭ la hereda malamiko de niaj prapatroj ni, hidraŭlikistoj nederlandaj, trovas la ĝojon de ĉiutaga interesa laboro!

TABELA TRARIGARDO pri la INFORMA LABORO EN 1952

<i>Landa asocio</i>	<i>Adreso de la Informa fako</i>	<i>Nombro de artikoloj</i>	<i>Prelegoj</i>		<i>Radio-prelegoj pri E.</i>	<i>Ekspozicioj</i>		<i>Disdonitaj afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj</i>	<i>Ĉu interesiĝo pri E. kreskis</i>
			<i>Nombro</i>	<i>Ĉeestintoj</i>		<i>Nombro</i>	<i>Cizitintoj</i>		
Brazila ..	Prof. Carlos Domingues, Rua Alvaro Alvim 27, Rio de Janeiro	790	25	1.600	48	4	7.000	11.000	Multe kreskis
Brita ..	J. W. Leslie, 140, Holland Park Avenue, London, W.11.	870	—	—	Neniu	10	8.000	6.000	Sendube kreskis
Finna ..	Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki-Kä Puhelin	100							Ne eble diri
Flandra (Belgujo)	Maertens G. Pr., Leopoldstr 51, Sint-Kruis.	60	—	—	1	—	—	200	Sensanga
Franca ..	Kolonelo R. Leger, Service de Presse, 34, Rue de Chabrol, Paris X.	300	50	3.000	112	Mankas	informoj	Mankas informoj	Stagnas
Rejnlanda-Vestfalia (Germanujo)	M. Schumacher, Fehrbellinstr. 5, Köln-Weidenpesch	161	—	Mankas	informoj	—	—	—	—
Hispana ..	D-ro R. Herrero, Calvo Sotelo 11, Valencia.	10	12	1.200	400	4	7.000	8.000	Iom post iom la publika opinio favoriĝas
Irlanda ..	Ne formiĝis speciala informa fako	10	4	100	Neniu	Neniu	—	100	Kreskis
Itala ..	G. Fighiera, Via Spallanzani 15, Torino	500	23	2.000	10	7 (en foiroj)	600.000	20.000	Grava kresko

Bosnia (Jugoslavujo)	Krajzl Josip, Splitska 6a, Sarajevo.	8	5	730	3	2	10.000	2.000	Ĝenerale kreskis
Kroata (Jugoslavujo)	M. Gjivoje, Vodnikova 19, Zagreb I.	110	20	2.700	16	9	5.000	1.500	Kresko precipe inter junularo
Nederlanda ..	Ges. Oosthoek, Bree 49a, Rotterdam-Z	2.500	119	5.000	125	20	10.000	20.000	Ĝenerale kreskis
Nikaragua ..	Ne havas—Informanto : T. Sekelj, Poste Restante, Managua.	10	6	500	4	1	8.000	5.000	Kreskis
Norvega ..	K. G. Sellin, Box 942, Oslo	1.088	40	1.400	10	3	Nekonte	7.000	Kreskis
Novzelanda ..	S. R. Perfect, P.O. Box 2982, Auckland, C.I.	160	6	Nekonte	10	3	Nekonte	200	Kreskis
Portugala ..	Ne havas—Informanto : Saldanha Carreira, Av. de Grao Vasco 33, Lisboa—Benfica.	30	2	300	Neniu	Neniu	Neniu	Neniu	Kreskis
Saarlanda ..	August Omlor, Beethoven- str. 36, Ingbert	44	3	200	—	1	50	Neniu	Multe kreskis
Slovena (Jugoslavujo)	Jager Emil, Titova 87, Ljubljana	25	3	140	7	4	800	1.100	Situacio bonega
Sveda ..	Sveda Esperanto Federacio, Tegelbacken, Stockholm.	450	10	300	Neniu	4	250.000	10.000	Iom kreskis
Svisa ..	Otto Walder, Eigenheim, Romanshorn.	41	7	300	Neniu	1	8.000	4.700	Kresko en gejunulaj rondoj
Urugvaja ..	Victor Luis Cao, Direccion Postal, Yaguaron 1397, Montevideo.	40	3	300	3	3	2.000	3.000	Sama kiel en antaŭaj jaroj
21 respondoj ..	Entute	7.307	338	19.770	749	76	915.850	99.800	Ĝenerale kreskis



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso—kutime 1 horon.
Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Lundo	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vitorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Seccion Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.45–22.15	Valencia. 43m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.40–07.45	Lille. 218m. I. Prof. Labit, 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	23.05–23.20	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. (nur unu fojon ĉiumonate). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum Nederlando.

Svisa Radio. El ricevataj raportoj ni konstatas, ke Radio Bern estas la plej ofte kaj bone aŭdata stacio. La daŭro de la elsendoj ja ne estas sufiĉe longa; tamen la talentaj prelegantoj scias plenigi tiujn malmultajn minutojn per valoraj paroloj.

Elsendo per nur mallongaj ondoj bedaŭrinde ne ebligas la posedantojn de simplaj aparatoj kun du ondoserioj kapti la programon. Kompense tiuj ondoj estas aŭdeblaj longdistance. La speciala, direktita disaŭdigo anoncita en la januara programo plene sukcesis. Sudamerikanoj, Portugaloj, ankaŭ Izraelanoj raportis pri bona aŭdebleco.

La kutimaj ĉiusemajnaj programoj estas plej bone ricevataj en Britujo kaj Francujo per ondoj 48.66m. Tamen la aliaj ondlongoj estas ankaŭ kapteblaj dum la tuta jaro laŭ variebla fortoco. El aliaj landoj ni ricevis neniun raporton. Kredeble samaj rezultoj estas atingataj en Belgujo, Nederlando kaj landoj najbaraj. Ni memorigas niajn legantojn, ke ilustrita programo estos sendata al ĉiu interesata aŭskultanto, kiu petos ĝin ĉe la stacio Radio Bern.



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.

Pri UNo kaj UNESCO

En la majo numero de *Esperanto* D-ro Ivo Lapenna defendas la uzon de *Unuiĝintaj Nacioj* anstataŭ *Unuigitaj Nacioj* kaj de UNESCO anstataŭ UNESKO. Li neniel sukcesas malpravigi la argumentojn de mia artikolo publikigita en *Amerika Esperantisto* (kaj represita en *La Studento*).

La diro, ke la termino *Unuiĝintaj Nacioj* estas “konforma al la propra spirito de la Internacia Lingvo”, estas kontraŭdirata per la atesto de aŭtoroj, kiuj havis pli bonan komprenon pri la spirito de Esperanto ol D-ro Lapenna. Uzante la analogan kazon de *Unuigitaj Ŝtatoj* aŭ *Unuiĝintaj Ŝtatoj*, mi citas la jenajn atestantojn: *Zamenhof* (ekz. *Originala Verkaro*, p. 444), *Kabe* (*Vortaro de Esperanto*, p. 167), *Wüster* (*Enciklopedia Vortaro*, Unua Parto, p. 39), la aŭtorojn de *Plena Vortaro* (p. 489) kaj de aliaj bonaj vortaroj (ekz. *Christaller* kaj *Jansson-Linden-Gerdman*). Ne temas pri diferenco de opinioj inter Lapenna kaj Solzbacher, sed inter Lapenna kaj la redaktoroj de *Esperanto* unuflanke, *Zamenhof*, *Kabe*, *Enciklopedia Vortaro*, *Plena Vortaro*, plus logiko aliflanke.

La klarigo pri OUN tute ne trafas mian argumenton, ke la termino estas erara kaj ke la Informa Fakto de la Unuigitaj Nacioj kondukis kelkjaran batalon kontraŭ la uzo de

United Nations Organization kaj analogaj formoj. La Informa Fakto sukcesis sufiĉe bone pri la anglalingva gazetaro, ne same bone pri franclingvaj kaj aliaj ĵurnaloj. La cirkulero de CED insistis pri la neceseco de “korekta traduko de teknikaj esprimoj”, sed mem donis nekorektan tradukon. Jen fakto bedaŭrinda.

La mallongigo de *Unuigitaj Nacioj* devas esti UN aŭ UNo (*ne* UNO). En UNo la *o* simple indikas la elparoladon (kiel en LoKoKo), ne mallongigon de *Organizo*, ĉar tiu vorto ne estas parto de la nomo.

Pri UNESCO la baza fakto estas, ke ĝi estas mallongigo de angla termino kaj ke en ĉiuj lingvoj, kiuj uzas la latinan alfabeton, oni skribas UNESCO (eble kun kelkaj negravaj esceptoj)—eĉ en la kroata lingvo, se la kroatingva parto de *La Suda Stelo* (ekz. Oktobro 1950, p. 18) uzas korektan ortografion. La uzo de UNESCO en la Esperanto-gazetaro havas groteskan historion. Vidante en *Esperanto* de Novembro 1950 leteron de iu B.L., proponanta, ke UEA uzu UNESCO, ĉar la vorto “konsistas el le ĉefliteroj de Unuiĝintaj - Nacioj - Eduka - Socia - Kultura- Organizo”, mi trovis tion amuza. “La bonaj redaktoroj de *Esperanto* sendube dormis, kiam ili lasis tian leteron eniri la paĝojn de la gazeto”, mi pensis, “ĉar ja la skribinto evidente neniam finlernis

la elementojn de nia lingvo, kies reguloj de vortkunmeto kaj stilo ne permesas tian monstraĵon !” Mia amuzo ĉesis, kiam mi poste vidis ke seriozaj aŭtoroj akceptis la strangan proponon kaj komencis literumi UNESKO.

Se la argumentoj de D-ro Lapenna estus pravaj, la francoj devus skribi OUNESCO. La formo UNESKO en Esperanto apartenas al la sama kategorio kiel la skribado de *Ĉerĉil* kaj *Ajznhaŭer* por *Churchill* kaj *Eisenhower* aŭ de *Ŝajo-Palaco* por *Palais de Chaillot*. Se io tia aperas en pure literatura verko aŭ en malgrava grupbulteno, oni povas preterpasi ĝin kun amuza rideto. Sed en seriozaj artikoloj pri la internacia vivo tia barbaraĵo estas netolerebla. Nia laboro jam estas sufiĉe malfacila sen la neceseco pardonpeti por tiaj nenecesaj strangaĵoj.

D-ro William Solzbacher

Membro de la Akademio de Esperanto kaj de la Prelegista Komitato por la Unuigitaj Nacioj, Delegito al la 3a Konferenco de la Usona Nacia Komisiono por UNESKO.

Pri UNO kaj OUN

“En la Internacia Lingvo la mallongigo povas esti nur OUN kaj neniel UNO ĉar UNO estas mallongigo de la angla “gazetara” nomo de la Organizaĵo” (*Esperanto*, p. 154, maja numero). Tiun argumenton mi trovas iom stranga ĉar en multaj partoj de Eŭropo—kaj verŝajne en la tuta mondo—oni diras: Unesko, Nato, kaj Unra por la formoj UNESKO, NATO kaj UNRRA, kiuj estas majuskloj de la

anglalingvaj titoloj de tiuj organizaĵoj. Se tiuj formoj povas enrampi en la ĝeneralan uzon spite al la nacilingvaj formoj, kial ne UNO, kiu cetere estas pli facile parolebla ol OUN, kaj kiu siatempe povos eĉ havi siajn derivaĵojn UNA, UNE, paralele kun UNESKA k.s. ? Rilate “Unuigitaj Nacioj” kaj “Unuiĝintaj Nacioj”, mi mem ĉiam uzas la unuan . . . por eviti la supersignon !

Mason Stuttard.

-iĝinta aŭ -igita

Permesu al malgrandulo aldoni kelkajn vortojn al la diskuto inter Doktoro Solzbacher kaj Profesoro Lapenna.

Ĉe la konsidero, ĉu oni en Esperanto devas uzi *Unuiĝintaj* aŭ *Unuigitaj*, ne tre gravas, kiel oni en naciaj lingvoj kutimas fari ; la grava kaj decida afero estas, ke la senco estu korekte esprimata, kiel ankaŭ Prof. L. diras.

Sed, kiam mi lasas min direkti de la senco en la pridiskutata demando, mi venas al : *Unuigitaj* Nacioj.

Ekzemplo A. 3 riveretoj fluas al sama punkto, de kie ili kune pluiras kiel unu rivero. Kvankam neniu ilin kunigis, ili tamen estas nun unu fluo ; ili simple unuiĝis ; do la rivero estas la *unuĝintaj* riveretoj.

Ekzemplo B. 3 riveretoj trairas regionon. Pro, ekzemple, trafikaj problemoj la homoj kunigas ilin en unu kanalon ; la kanalo estas la *unuigitaj* riveretoj.

Do, se oni konsideras la aferon OUN analoga al ekzemplo A, oni uzu *Unuiĝintaj* Nacioj ; laŭ mia scio ĝi analogas al ekzemplo B, tial mi trovas *Unuigitaj* Nacioj pli ĝusta.

C. Graversen, Danlando.

M. de Waard :

Pri Digoj, Polderoj kaj Inundoj

LA granda kaj terura inunda katastrofo, kiu trafis Nederlandon en la fino de januaro 1953 kaj kiu viktimitis ĉirkaŭ 2000 homojn, tiris la atenton de la tuta mondo al la signifo de *digoj* kaj *polderoj*. Precipe en lando, kia Nederlando, kies okcidentaj provincoj kuŝas grandparte sub la mara nivelo, la ŝirmaj digoj estas de baza signifo por la daŭra ekzisto de la lando. Ili do bezonas senĉesan zorgadon kaj riparadon.

La digo ŝirmas kaj protektas la landon kontraŭ la akvo, la maro. La mara nivelo ne estas ĉiam la sama, sed dependas de la *tajdo*. Dum alfluo (*fluso*) oni parolas pri “alta tajdo”, dum defluo (*malfluso*) pri “malalta tajdo”. La alteco varias i foje kelkajn metrojn. Estas klare kompreneble, ke dum forta ventego la supreniĝo de la akvonivelo estas multe pli alta ol dum normala vento. La akvo ja estas pelata de la ventego sed estas barata en sia vojo de la digo. Sekve: la akvo bategas kontraŭ la akva flanko (=la *ekstera* flanko) de la digo, spertas ĝin kiel barilon, sed ne povas reflui pro la konstanta blovado, do: amasiĝo de akvo, kiu kaŭzas leviĝon eksterordinaran de la nivelo.

La enlanda flanko nomiĝas la *interna* flanko de la digo. Ĝi ne bezonas tian firman, malmolan supran tavolon, kian oni faras sur la ekstera flanko, ĉar la akvo ne tuŝas ĝin. Plej ofte sur la interna flanko kreskas herbo.


La supro de la digo (oni nomas ĝin *verto* aŭ *krono*) devas esti tia, ke eĉ la plej ebla alteco de la mara nivelo

ne superu ĝin, por ke eĉ en tia okazo ne fluu akvo en la *polderon*. Poldero do estas la tuta regiono, situanta malantaŭ la digo, je submara nivelo.


Tri malamikoj daŭre minacas la trankvilan ekziston de la digo: 1) la senĉesa alterno de alfluo kaj defluo; 2) la konstanta *eraziado* pro la akvo, fluanta paralele al la digo (precipe por riverdigoj) kaj 3) la trapenetremo de la akvo tra la digo. Por ĉi-lastaj la materialo, el kiu konsistas la diga korpo, estas tre grava. Oni facile komprenas, ke sablo tute ne taŭgas. En nia lando oni preferas specialajn specojn de argilo, kies eroj estas tre kunfluemaj kaj ne-tralasemaj al akvo. Se tamen digoj estas tre grandaj (t.e. larĝaj kaj altaj), kia ekzemple la kvardekkilometra ŝirmdigo tra la Zuiderzee, la kerno povas konsisti el sablo, ĉirkaŭita de dikaj tavoloj el argilo, t.n. *glaciala argilo*.

La fenomenon “tajdo” kaŭzas la altiremo (*gravito*) de luno kaj suno. Laŭ astronomiaj tabeloj oni do povas antaŭe kalkuli la horojn kaj altecon de la alfluo. Uzante krome la sperton de jarcentoj oni povas fiksi la necesan altecon de digo.

Kio nun kaŭzis la grandan katastrofon je la 31a de januaro 1953? Tiam je ne nur *rompiĝis* (frakasiĝis) digoj pro la fortega martelado de la ventego vipata maro, sed la alfluo plurloke estis tiel alta, ke la furioza akvo superfluis la vereton de la digoj. Pro tio inundiĝis la polderoj, pro tio difektiĝis la mola enlanda flanko de la digoj kaj sekve disfalis la tuto. Je tiu dato okazis tre malfeliĉa, malbonŝanca kolizio de



r : nivelo dum ventego
s : normala alta tajdo
t : normala malalta tajdo



- | | | | |
|----|---|----|--|
| a: | IJssel-lago | j: | plibonigo de la tero per fosita kanalo |
| b: | somera nivelo | k: | rezervita por fervojo |
| c: | vintra nivelo | l: | ĉefa ŝoseo |
| e: | molaj tavoloj el torfo kaj argilo | m: | glaciala argilo |
| f: | dekliivo, kovrita per brikoj | n: | sablo |
| g: | dekliivo, kovrita per ŝtonoj inter fostoj | o: | argilo |
| h: | poldero | p: | matracego, plipezigita per ŝtonoj |

Klarigo: "Plibonigo de la tero per fosita kanalo". Tio ĉi signifas: unue oni dragas la aĉajn tavolojn, konsistantajn el netaŭga grundo, tiel ke ekestas kanalo. Tiun kanalon oni plenigas ekz. per sablo, kiu formas bonan bazon por digokonstruo. Pro tio oni parolas pri "plibonigo de la tero"

malfavoraj cirkonstancoj: krom la normala ĉiumonata fazo de la luno, kaŭzanta normalan altan tajdon ("saltotajdo"), la mara nivelo jam dum kelkaj tagoj estis pli alta ol kutime kaj nun aldoniĝis la malfavoro de eksterordinare forta ventego nordokcidenta. Tiu ĉi vipis la maran akvon per nekontroleblaj fortoj, tiel ke ĝi amasiĝis en la funelformaj *buŝoj* de la nederlandaj riveroj, kune formantaj la deltaon de niaj sudokcidentaj provincoj. La sekvoj estis katastrofaj: sur dekoj da lokoj la digo disfalas meznokte. La akvo ĵetegis sin internen kaj inundis kampojn, domojn, vilaĝojn kaj . . . homojn. Preskaŭ dumil personoj, inter kiuj tutaj familioj, pagis per sia vivo al la pramalamiko: la akvo!

La konstruo de la digo

Sur la figuroj, apartenantaj al ĉi tiu artikolo, oni vidas la specialan formon de digo. La ekstera flanko (=la mara flanko) ne leviĝas vertikale el la akvo, kiel oni kutime vidas tion ĉe kajaj muroj. Ne, kontraŭe, tiu flanko havas tre malakran oblikvon. Ĝia supra linio formas nur malgrandan angulon kompare al horizontalo. La kialo de tiu facila deklivo estas, ke la alruliĝantaj ondoj perdas preskaŭ tutan sian forton dum la ruliĝo supren, tiel ke ili baldaŭ estas "mortaj", do sendanĝeraj. La flankon de la digo inter nivelo de ĉiutaga normala malalta tajdo kaj normala alta tajdo konstante atakas la akvo. Tiu parto do bezonas specialan ŝirmon. Oni protektas ĝin per ŝtontavolo; sur la supro de la argilo oni metas fortan plektaĵon de pajlo, kovritan per tavolo da brikoj aŭ ŝtonpecoj. Sur ĉi-lastaj oni starigas t.n. *kolonojn* el bazalto. Tio estas seslateraj pecoj da bazalto,

starigitaj unuj dense kontraŭ la aliaj. La tuton oni enfermas per vicoj da specialaj kverkaj fostoj, longaj ĉ. 2 m. Antaŭ la plej antaŭa vico de fostoj oni ĵetas (sub la akvon) ankoraŭ amason da pezaj ŝtonpecoj. Lastatempe oni ofte anstataŭas la bazaltajn kolonojn per pli regulaj blokoj el armita betono.

Se la subakva profilo de la digo (ĉe la piedo de la digo) ne estas horizontala, sed se ĝi ankoraŭ estas oblikva, dekliva, tiam estas necese protekti ankaŭ tiun parton de la digo. La subnivela fluado de la akvo povas grave subfosi la korpon de la digo kaj kaŭzi ties disfalon. Fari saman ŝtonprotektaĵon, kian mi priskribis por la supernivela parto, ne eblas ĉi tie. Tiucele oni konstruas t.n. plektitan matracegon, kiu, plipezigita per ŝtonpecoj, subakviĝas kaj ekkuŝas sur la protektota fundo.

Tia matracego konsistas el granda mato, plektita per faskoj da rezistemaj vergoj, branĉoj, kune fiksitaj kaj interligitaj per branĉoj, drato kaj aliaj ligiloj. En la periodo inter du tajdoj (dum *morta tajdo*) oni trenas la maton, kiu ofte havas grandecon de 20×80 m., super la lokon, kie ĝi devos kuŝi. Oni ĉirkaŭas la matracegon per aro da ŝipoj, ŝargitaj per pecoj da peza ŝtono. Laŭ certa ritmo arego da laboristoj komencas ĵeti la ŝtonojn sur la matracegon. Pro tio ĝi peziĝas kaj komencas trankvile subaviĝi. Tiu ĵetado estas laboro, postulanta multan faksperton de la laborestro—se la matracego fariĝos tro peza sur unu flanko aŭ en la mezo, ekestas danĝero, ke la tuto renversiĝos aŭ rompiĝos.

El la supra, nedetala priskribo pri digokonstruo oni komprenas, ke tio estas tre multekosta afero. Sed same

fino sur paĝo 225

Majoro T. C. Hawley :

Mi eskortis la Reĝinon

SUPERSTIĈOJ ne ĝenas min, sed unu dato, la 19a, tiom ofte portis al mi maloftaĵojn, ke mi komencas konsideri ĝin kiel mian tagon de bonsorto.

La 19an de Januaro 1953 oni informis min, ke mi estas elektita en la Sud-Afrikan kontingenton por la Kronado en Anglujo. Mia 25-jara servado en la Polico Sud-Afrika efikas kiel imunigo kontraŭ ŝokoj, kaj ankaŭ kontraŭ ekscitiĝo. Tamen, tiu informo ja skuis min. Mi konfesu, ke mi ektremis kaj tuj telefonis al la edzino. Kiel stepa brulo la novaĵo disvastiĝis tra la urbeto Aliwal North, kie mi estas la Distrikta Komandanto.



Majoro T. C. Hawley

Miaj du filinoj, May (Esperantistino) kaj Marie, respektive 18- kaj 16-jaraĝaj (je la aĝo, ĉu ne, kiam reĝinoj, princinoj kaj *tutaparte* princoj vivas ankoraŭ precipe en la regno de la ferakontoj) tiel ekscitiĝis, ke mi eĉ iom bedaŭris la prudenton kiun alportas la matureco.

Estis plua kialo de la estimo de mia familio al la penso, ke mi ĉeestos la Kronadon de Reĝino Elizabeth. Dum la reĝa rondestkurso tra Sud-Afriko en 1947, ni ricevis la maloftan privilegion distri la reĝan familion dum mateno ĉe tiu tre bela Dresejo por Hundoj de la Sud-Afrika Polico en Pretoria. Ili babilis kun ni kaj lasis ĉe ni grandan estimon por la ĉarmo kaj simpla sincereco de tiu glora familio.

* * *

Nia transportŝipo, la "Durban Castle", lasis Kapurbon je la 29a de aprilo. Preskaŭ la tutan tempon, la vetero estis bela, lasante rigardon al lazuraj ĉieloĵ supre kaj nigregaj akvoĵ sube, kie kelkfoje la maro estis profunda 5.000 metrojn. Ni ripozetis ĉe la insulo S-ta Helena je la 3a de majo, poste haltis ĉe Ascension Island kaj Las Palmas, kaj fine vojaĝis laŭ la Tamizo je la 15a de majo.

Oni postenigis nin ĉe Pirbright, kie eĉ dum nia prepariĝo ni povis rigardi la pacoplenan belegan kamparon. Inter la eroj de la prepara programo ni forfuĝis al Londono por eduki nin pri la kompleksa organizo, kiu batigas la pulson de tiu ĉi vastpotenca metropolo. Tiom granda ĝi estas

tiom estas vidinda kaj tiom lerninda. Fulmrapide la menso rekaptas la Turon de Londono, kie mi, privilegiita, povis vidi la fabelecajn Kronjuvelojn, kaj iom lernis pri iliaj historio kaj simboleco. Profunde impresis min la tradicioj kiuj formas la ĉefŝtonon sur kiu konstruiĝas la respekto kaj honoro, kiujn tenas la angla popolo por siaj regnestroj.

En Londono, kie ajn tio eblas, troviĝas pitoreskaj ĝardenetoj, eĉ vastaj belaj parkoj; ankaŭ tiuj mirindaĵoj, la subteraj vagonaroj; kasteloj, palacoj, antikvaj preĝejoj, senlimaj artotrezoroj. . . . La senlima, vasta ĉio defias la komprenpovon de okaza vizitanto kia mi. Kion mi pensas pri Londono? Mi provu respondi al tio kiam la kapo ĉesis zumi!

Denove la Fortuno ridetis je mi! Plaĉa sperto mia estis la ĉeesto ĉe la konferenco de la B.E.A. en Bournemouth je la 24a kaj 25a de majo. Mi estis unu momenton alveninta, neanoncite, kiam mia verda stelo—tiu tuja pasporto al la vasta mondo—allogis S-ron

Broadway, kiu insistis, ke mi restu ĉe ili. Ili estas afablaj, simpatiaj homoj, kaj laŭ la plej bona Esperantista tradicio mia restado ĉe ili estis plej plaĉa.

Tiun dimanĉan posttagmezon la Diservo, tute en Esperanto, altiris grandan ĉeeston. Oni devas sperti la solenecon de tia ago adora por vere ĝin taksi. Sub la verda stelo, homoj el ĉiuj nacioj povas inteligente kuniĝi por adori la Universalan Spiriton, la Ĉiopovan Dion, anstataŭ—kiel ofte faremas homo—redukti la koncepton de Dio ĝis la nivelo de nacia heroo, kiu apartenas al kaj favoras al lia propra sektogrupa. Post kortuŝa ĥorkanto oni anoncis la unuan himnon. La familiara melodio tiom regis min, ke mi ne povis unu sonon eligi; kaj kiam fine la kanto en mia koro atingis la voĉkordojn, mi ne povis rekoni la propran voĉon!

Sed nun ree al la temo! Tamen estus senutile, ke laiko kia mi eĉ provu priskribi la atmosferon ĉe la antaŭkronadaj preparoj eĉ unu semajnon antaŭ la evento. La fervoro firme, konstante, sobre



Vidaĵo dum la kronada ceremonio

kreskis. Tiu brita popolo amas sian Reĝinon. Ili honoras la Kronon. Sen ĝi oni ne povas imagi la popolon —stranga fenomeno, en epoko kiam la plimulto de la dinastioj fariĝis eksmodaj.


Fine, la 2an de junio. La laŭtparoliloj je 5.30 ordonis la leviĝon. La vetero aspektis malplaĉa —oni antaŭvidis pluvon.

Antaŭ la matenmanĝo venis peretere la bonega informo, ke Hillary kaj Tensing estis atingintaj la supron de Everest. Kia glora novaĵo por Ŝia Reĝina Moŝto. Tio sendube estis granda stimulo al tiu brava sinjorinetto fronti la taskon kiu staris antaŭ ŝi en tiu tago.

Antaŭ la 10a ni ekmarŝis. Sakflutoj akompanis nin laŭ la unuaj kelkaj kilometroj, sed kiam ni alproksimiĝis al la Ĝardenoj de Kensington ili silentis. Per la laŭtigiloj venis al niaj oreloj la melodio de la Haleluja-horaĵo de Handel, el la Abatejo de Westminster. Eĉ la tamburado de marŝantaj piedoj nenion forprenis de la belegeco de tiu prezento fare de la Ĥoro de Westminster.

Dum ni antaŭen marŝis, aperis ĉe mi la konstato, kiun antaŭe mi estis nur nebule pripensinta, ke kvankam mi estas ĝuste en la procesio, mi devos rigardi nur rekte antaŭen, konservi la ĝustan pozicion, kaj atenti la paŝon. Ni estis marŝantaj preskaŭ tri kilometrojn antaŭ la ora reĝa kaleŝo, kaj kvankam ni ne estis vidontaj la Reĝinon mem, ni povis tutfacile bildigi por ni tion, kio okazas malantaŭ ni. La akklam-ondoj kiuj ruliĝis de la neimageble grandaj homamasoj trans la antikvan civiton rakontis mem la historion.

La neelĉerpebla riĉeco de tre multaj lingvoj estis uzata per la radio, televido kaj ĵurnalaro por priskribi la



La reĝino en la kronada procesio

solenecon de la Kronado, kaj la reagon de Londono.

Kiam ni estis marŝintaj la tutan vojon, nia kolono celis al okcidenta Londono—post marŝo de sume 25 kilometroj. Niaj gamboj estis sensentaj, la piedoj pezaj—sed la koroj estis gajaj dum la sakflutistaro de Fife eskortis nin al la stacitendaro. Ni, kiuj venis de malproksimaj landoj, povos liveri kelkajn interesajn rakontojn al niaj gefiloj—aŭ eble al niaj genepoj.

**ELIN PELIN :
ELEKTITAJ RAKONTOJ**

Traduko de Simeon Hesapĉiev.
96 paĝoj. Aŭ frankite 2ŝ. 2p. aŭ 7 rpk.

Mendu ĉe U.E.A.

Ŝolem la Ĉifonisto

En kabano ĉe la vojo
vivis Ŝolem, ĉifonisto.
Ege premis lin malĝojo
pro la plagoj de l' ekzisto.
Dum li veis kaj malbenis,
la rabeno pretervenis.

“Kiel, Ŝolem?” “Oj, ĉielo,
mia vivo malfeliĉas!
Jen en nia kabanĉelo
loko tute ne sufiĉas.
Tri el nia infanaro
devas dormi ĉe najbaro!”

“Ho, nin helpu en la sorto,
ĉar vi tiel alte saĝas!
La ĉifonoj sur la korto
ĝis kameno odoraĉas!
La kaprin' apenaŭ laktas,
en mizeroj ni baraktas!”

“Bone, Ŝolem. Sed la manojn
ne faligu do en vano:
Prenu kune la infanojn,
ĉiuj dormu en kabano.”
“Ĉiuj en kabano? Ho ne!”
—“Faru tion. Estos bone.”

Ŝolem faris. Noktahore
la infanoj plende bruis,
puŝis, veis, ĝemis plore—
ĉies dormon ĝi detruis.
En mateno Ŝolem, ho ve,
iris al raben' denove.

“Kiel, Ŝolem?”—“Ho rabeno,
gloro al la Dia nomo!
Tamen regas nur ĉagreno
kaj tumulto en la domo!
Kion fari? Ho, konsilu,
ke la vivo pli facilu!”

“Bone, Ŝolem. Do enportu
la ĉifonojn—” “He, sinjoro,
kion? Mi prefere mortu!
Nin sufokos laodoro!
Ankaŭ la ĉifonoj? Ho ne!”
—“Faru tion. Estos bone.”

Ŝolem faris. Kiel pompis
la parfumo! Ho Jehovo!
La plejaĝa filo rompis
vitron por aera blovo.
Ŝolem kun hezita treno
iris re al la rabeno.

“Kiel, Ŝolem?”—“Dio benu!
Tre malbone! Kian planon
vi konsilas?”—“Ke vi prenu
la kaprinon en kabanon,
kaj la vitron vi riparu.”
“Kion??”—“Estos bone. Faru.”

Ŝolem faris. Nun ĉikanis
la edzino histerie,
la infanoj ekmalsanis,
la kaprino estis ĉie!
Ŝolem longe ĝin toleris,
fine ĉe l' raben' aperis.

“Kiel do?”—“venata estu
via barbo, ho rabeno.
Miajn vortojn ne protestu,
sed ni vivas en geheno!
Krevas nervoj de l' edzin'.
Pia moŝt', kompatu nin!”

—“Petu al najbaro bona,
preni nokte tri infanojn . . . ”

“Kia saĝo salomona!
Ho, mi kisas viajn manojn!”
Iris Ŝolem facilmova
hejmen kun espero nova.

“Kiel, Ŝolem?”—“Ho, pli bone!”
—“Jen, vi vidas: venas ordo.
La ĉifonojn nun endome
loku ekster via pordo.”

“Majstre via penso trafas!
Ho, vi oran kapon havas!”

“Nu do, Ŝolem?”—“Ho, sen fino,
glor' al via saĝa vorto!
Restas nur . . . ” —“Ĉu la kaprino?
Ŝin starigu sur la korto.”

“Dankon, dankon, ho rabeno;
ni jam vivos en edeno!”

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 251.

3an de junio 1953

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de majo kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1952 :

	1952	1953
Asociaj membroj	3842	4768
Individuaj membroj :		
MJ 769		711
MA 3508		3405
MS 460		514
Patronoj .. 9		6
DM 259		259
HM 57		58
	5062	4953
	8904	9721

DELEGITOJ

Aŭstralio

Mount Waverley (Victoria). D : S-ino I. Fink, 100, Headingley Road. Tel : J.B. 2880.

Nowra (N.S.W.). D : R. F. Latimer, Chiefs' Mess, R.A.N.A.S., H.M.A.S. Albatross, Nowra 6 C., N.S.W.

FD (Aeronaŭtiko) : La D.

Britujo

Darlington. D : Vakas.

Germanujo

M. Gladbach (22a). FD (Naturkuracado) : K. A. Metzkes, Burggrafenstr. 52.

FD (Psika esploro) : Vakas.

Italujo

Milano. FD (Turismo) : Vakas.

Kanariaj Insuloj

Las Palmas de Gran Canaria. VD : J. Parada Ruiz, Viera y Clavijo, 11 (Fotografia).

FD (Fotografio) : La VD.

Svedujo

Högsby. D : Erik Boge, Högsby, Småland. Tel : Högsby 23.

Norrahammar. D : Vakas.

Usono

Hollywood (California). D : J. R. Scherer, 1237 No. Alexandria Ave., Hollywood 29. Tel : OL 5103.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1953

502. Newell, S-ro L. N. M., Khartoum, Sudano.

503. Strand, S-ro E., Melandsjø, Norvegujo.

504. Ison, F-ino H. M., Colchester, Anglujo.

505. Jacobi, S-ino E. A., Johannesburg, Sudafriko.

506. Middlemast, S-ro A. H., Glasgow, Skotlando.

507. Agnar, S-ro H., Bell Gardens, Calif., Usono.

508. Rosenzweig, S-ro B., Nancy, Francujo.

509. Amaral, S-ro Inğ. H., Funchal, Madejro.

510. Sindhwad, S-ino E., Chicago, Usono.

511. Chapman, S-ro J. L., West Palm Beach, Usono.

512. Dillinger, S-ro H. E., Placerville, Usono.

513. Helfgot, S-ro S., Buenos Aires, Argentino.

514. Iggers, S-ro G. G., Little Rock, Ark., Usono.

DONACO al la Ĝenerala Kaso : H. Agnar, 7ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Ŝolem la Ĉifonisto (*fino*)

La geedzoj ĉe l' kameno
sidis kun la familio.

Ili pensis kun timemo :

“Kiel bona estas Dio !


Ni de Li profitas ĉion.

Kiel ni meritas tion ?”

Karaj ! Dum la amuziĝo,
lernu de l' fabel' naiva,
ke feliĉ' aŭ malfeliĉo
estas ĉiam relativa.

Reto Rossetti.

Enigma Konkurso N-ro 80



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj :

N-ro 179 :

Se venus ankoraŭ ventegoj, batal',
Ni estas jam bone harditaj ;
Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal',
Nek ies perfidoj subitaj.
Nenio en mondo elŝiros ĝin for,
Ĝi havas radikojn profunde en kor'.

N-ro 180 : Barometro-maró ; aligatoro-aglo ; tribunalo-nulo ; apostrofo-orfo ; demokrato-mato ; integralo-aglo ; labirinto-nabo ; arkeologo-oleo ; valeriano-nilo ; ekvilibro - levi ; narkotiko-arko ; travestii-veti ; originala-ario ; nostalgio-sola.

N-ro 181 : **Sopiro** pelis lin hejmen. Mia nepo morgaŭ venos. Li trinkis tri botelojn da biero. Oni aplaŭdis la **viglan** oratoron. **Omaron** oni ordinare ŝatas. Li volis pafi gorilon. La peza **briko** tondre falis. Mi ricevis **koran** ĝojigan saluton. Li aĉetis por si **likvoron**. Je mia miro li volis foriri.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 76-a konkurso : F-ino J. J. van Thiel (Ned) 168 ; S-ro J. K. Slade (Angl) 165 ; S-ro I. Ekström (Finl) 164p.

Enigmo N-ro 185 : Krucvortenigmo. Por figuro prenu kvadraton, dividitan en 10 × 10 malgrandajn kvadratojn. Se post iu numero troviĝas pluraj difinoj, vi plenigu same multe da vortoj. (R) signifas : Radiko. En la figuro ne troviĝas nigraj fakoj.

HORIZONTALALE : 1. diletanto + konjunkcio ; 2. peni por plenumi taskon + havi detalan ideon pri io ; 3. speco de tetrao + ne pli ol ; 4. eksplodilo + longa, rekta, ornama sulko ; 5. estas ofte malpermesita sen speciala bileto + estaĵo, konsiderata de primitivuloj kiel praulo kaj protektanto(R) ; 6. surskribo + feki ; 7. difinita aparta cirkonstanco + rusa monero(R) ; 8. legomo(R) ; + suferi pro bedaŭro al io perdita ; 9. el kara metalo + konjunkcio + poemo(R) ; 10. perforta forpreno + loko kie oni glazurbriligas.

VERTIKALE : 1. ekbruligilo + konjunkcio ; 2. trempi en vinagro + amika ; 3. homo kiu kontraktis por ricevi ion (R) + aziano(R) ; 4. ceremonia vesto + floreto ; 5. respondo farita nome de diaĵo + natria klorida(R) ; 6. reciproka konduto inter du personoj + malsaneca dormo(R) ; 7. parto + rusa monero(R) ; 8. poemo + respektoplena al Dio(R) + adverbo ; 9. malplezuri pro neokupiteco(R) + ili alportas ĝojigan aŭ malĝojigan novaĵon ; 10. tio kion oni parolas + imperiestro.

Enigmo N-ro 186 : Krucvortenigmo kun figuro el 12 × 12 kvadratetoj.

HORIZONTALALE : 1. ŝargbesto + poparta ; 2. parolanto + tien oni povas ĵeti ion ; 3. el tio oni faras kolĉenojn + malofta(R) + ĝi aŭtune ofte kovras plantojn(R) ; 4. kopio + malnova sunhorloĝo ; 5. malgrandulo + sovaĝa besto(R) ; 6. inspiri piajn sentojn + ŝategi(R) + ago de iu kiu sin miksas en societo, kie li ne estas ŝatata ; 7. monato + prefikso + longa metala stango(R) + numeralo ; 8. orda numeralo + muzikinstrumento ; 9. subteni pezan objekton + ekzistas nur tri da ili sur nia tero ; 10. persona pronomo + arde aspiri al iu celo(R) + prepozicio + persona pronomo ; 11. iri post iu + drasta ; 12. montra pronomo + arterio + agrabla odoro(R).

VERTIKALE : 1. loko por dombestoj + prepozicio ; 2. bonodora + titolo + malkonfesi ; 3. trempi en vinagro + konifero ; 4. detala tabelo + nereala ; 5. herbaĉo + demanda pronomo + lertmova vertebrulo ; 6. geografia priskribo de montoj + prepozicio ; 7. vegetaĵa pikilo + nombro ; 8. malgranda + numeralo + superabunde + trinkaĵo ; 9. elemento de formulo + prefikso + entuziasma ; 10. sufikso + malutila besto + nigrulo(R) ; 11. besteto + ĉia elementa objekto de kono ; 12. klinko + partoj de spaco + adverbo.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu du da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Tiam aŭskultu en la ĉielo, en la loko de Via loĝado, ilian preĝon kaj ilian petegon, kaj defendu ilian aferon. *I Reĝoj 8: 49.*

Internacia Kultura Semajno, 3-10 Aŭgusto 1953, en Kultura Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkuponon G. Odent, Lycée de LAON, Aisne, Francujo. Represo petata.

Kultura Esperanto-Domo akceptos laŭeble de junio ĝis septembrofino ĉiulandajn Esperantistojn. Eventuale iam ajn ankaŭ karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkuponon al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGE, M-et-L., Francujo. Represo petata.

La Nova Kristaneco en la lumo de scienco, bazita je la universala analogio kaj je la interna senco de sankta Biblio, anoncita en verkoj de sveda scienculo kaj reformanto Em. Swedenborg, malkaŝas la misteron de homa animo kaj postmorta vivo. Postulu la traktatojn senpage. Aldonu rpk. Adr. Jan. B. Vlach, Luzická 21, PRAHA XII, Ĉeĥoslovakujo.

Ringwood Grammar School (Fondita en 1577), West Hill Road, BOURNEMOUTH, Anglujo, bonvenigas knabojn el Britujo kaj aliaj landoj por eduko cele al Ĝenerala Eduka Atesto aŭ por libertempo.

37 progresintaj gelernantoj deziras korespondi tutmonde. Skribu tuj al S-ro Claramunt, Esperanto-Grupo, Kooperativo, Teruel 26, BARCELONA, Hispanujo.

Por Esperanto-ekspozicio ni petas helpon de ĉiuj samideanoj. Belaj poŝtkartoj, leteroj kaj ĉiaj esperantaĵoj kore bonvenaj. Ĉiu sendanto ricevos fotografaĵon pri nia urbeto. Sendu ĉion al: "La verda Kolombejo", Esp.-Grupo, CIANO SANTA ANA, Asturias, Hispanujo.

Por 5 rpk. aŭ monb. m. s. belajn k.m. pm. germ : afr. filatele. Karlo Schmauder, Im Hag 6, STUTTGART-Unterturkheim, Germanujo.

Fraŭlino, 20-jara, korespondos tutmonde. Nepre respondos. Janine Cagnon, 9 rue Coli, RABAT, Maroko.

Tutmondo ! Bonvolu sendi esperantaĵojn por licea ekspozicio al: Cartwright, 61A Surrey Street, NORWICH, Anglujo.

15 junulinoj deziras poŝtkarte korespondi. Skribu al Fraŭlino Correy, 20 rue Bersot, BESANCON, Francujo.

Kinemateknikistoj ! Mi deziras korespondi kun vi pri la reliefaj teknikoj en via lando. Plezure mi akceptos leterojn eĉ de simplaj kinematografuloj kiuj interesiĝas pri tiu afero. Skribu al M. Bury, Boite postale 85, LIÈGE Centre, Belgujo.

Deziras informojn pri la problemoj "loĝejo-mizero" (manko de loĝejoj) kaj ĝia solvo en aliaj landoj, E. Anderegg-Gurtner, HORN am Bodensee, Svislando.

Studento de fiziko volas korespondi kun gestudentoj: Pidhaini, 381 Concord, TORONTO, Kanado.

Internacia Framasona Ligo. Ĉiuj esperantistoj-Framasonoj estas invitataj aliĝi al la Esperanto-sekcio de I.F.L. Adreso: 8 rue du Persil, BRUXELLES, Belgujo.

Esperanta Ekspozicio okazos Sept. 5an. Bonvolu sendi ĉion rilate al nia movado. Nepre respondos. S-ino Cant, "Highfield", Hexham Road, Heddon on the Wall, NEWCASTLE-UPON-TYNE, Anglujo.

Deziras korespondi kun geamikoj tutmondaj, bildkartojn kaj leterojn: Anne Schöttner, Bergshyttan, BROVALLEN, Svedujo.

25a NACIA KONGRESO DE LA ITALAJ ESPERANTISTOJ

Como — Vilao Olmo, 5-9 Sept. 1953

Ĉiuj eksterlandaj samideanoj estas kore invitataj partopreni la Italian Jubilean Kongreson. Petu aliĝilon ĉe Ente Provinciale Turismo, Como, Italujo. Ili ricevos senpage la kongreskarton.

Montaj kaj ŝipaj ekskursoj sur la fama lago. Prelegoj. Teatraj kaj dancaj festoj. Turismaj allogaĵoj.

Aliĝu ! Aliĝu !

LA ALASKA STAFETO kaj **KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ**

Originale verkitaj de F. Omelka

La supraj verkoj aperis unue kiel felietonoj en "Esperanto" 1949 kaj 1951.

Ili nun aperas en libroformo, kun aldonitaj fotoj, skizo pri la aŭtoro kaj plano de Alasko.

Formato 22 × 14.5 cm. 96 paĝoj

Tole bindita kun bilda polvŝirmilo

Prezo 6 ŝilingoj, afranko 4p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe vialanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Tri monumentoj de la mondliteraturo

varme rekomendataj de la tuta Esperanta gazetaro pro la lingva perfekteco :

La Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, trad. de Porto Carreiro Neto.

Enhavanta 1018 demandojn kun detalaj respondoj pri ĉiuj problemoj de la homa vivo antaŭ kaj post la morto.

1 vol. 532-paĝa, bonega papero, broŝ. 10ŝ. 6p., afranko 9p.

La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec, trad. de I. G. Braga.

Ĝi estas la plej klara eksplikado de la kristana religio el vidpunkto spiritisma.

1 vol. 432-paĝa, broŝ. 8ŝ. 6p., afranko 8p.

Antaŭ du mil jaroj . . . de F. C. Xavier, trad. de Porto Carreiro Neto.

Historia romano pri la naskiĝo de Kristanismo kaj la Roma politiko de la 1-a jarcento de nia epoko.

1 vol. 400-paĝa, broŝ. 15ŝ., afranko 6p.

Mendu ĉe

**Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo**